



INSTITUTO PENSORGANIZO PRI MONDA E-JURNALISMO TEO JUNG

PENSORGANIZO PRI MONDA E-JURNALISMO
TEO JUNG



HEROLDO DE ESPERANTO
INTERNACIA NOVAĴAGENTEJO
HDE EN PLURAJ LINGVOJ
RILATOJ KUN ĴURNALISMAJ INSTITUCIOJ
ĴURNALISMAJ EVENTOJ
ELDONADO DE FAKAJ PERIODAĴOJ

Instituto Teo Jung

Kiaj estos la esenco kaj la estonteco de *Heroldo*? Ĉi-jare la 103-a UK estos la loko kie la abonantoj de *Heroldo* ludos gravan rolon en la evoluo de la gazeto kaj de la E-movado ĝenerale. **p. 7**

INTERVJUO

Ne flagoj, sed agoj...

... sub nuba ĉielo. Intervjuo kun Jolanta van Holstein, pri la agado por Esperanto kaj pri la situacio en Eŭropo kaj en la tuta mondo. Klara analizo pri la estanteco kaj la estonteco de la E-entrepreno kaj pri la efika uzo de nia lingvo. La Unua libro estas kaj restos la gvidilo por atingi la superan celon de Esperanto.

pp. 4 kaj 5



LA ROLO DE LA JUNULARO EN LA RENOVIGO DE LA E-MOVADO

TEJO spertis malfacilaĵojn dum la pasinta jaro kaj lastatempe ĝia prezidanto demisiis pro personaj kialoj. Ĉu la agado de la junularo reduktiĝos aŭ eĉ ĉesos en nia movado? Tute kontraŭe, *Heroldo* opinias, ke TEJO povas komenci revolucion. **p. 2**

NACISMO KAJ ESPERANTISMO

Ŝajne kelkaj esperantistoj estas naciistoj. Ĉu tio vere estas kontraŭ la interna ideo? Rubén Fernández Asensio donas alian vidpunkton post la analizo pri la artikolo verkita de A. Fabián Jiménez en la antaŭa numero de *Heroldo*. **p. 3**

ABONU

HEROLDON




www.heroldodeesperanto.com

spegulo

Kial oni devas akcepti kritikojn

Akcepti kritikojn estas iom komplike sed necese por plibonigi nian penson. Tamen debati trankvile ne facilas. Xavi Alcalde, la aŭtoro, kontentos se lia artikoleto estos kritikata sen insultoj kaj sen personaj atakoj. Kiel reagon, li pretas plibonigi siajn ideojn, akceptante la fakton, ke verŝajne li ne tute pravas.



Enrico Coraci - talenta itala pianisto **p. 3**

ĈEFARTIKOLO

TEJO kaj ĝia rolo en la renovigo de la E-movado

TEJO, ekde 1938, estas la rilatpunto de la junularo en Esperantujo. Tamen la freŝa demisio de ĝia prezidanto Enric Baltasar kaj la peza defcito de la asocio puŝis la redakcion de Heroldo pripensi la rolon de la junularo en nia movado kaj en la mondo. UEA mem spertis gravan mon-mankon pro malabundo da enspezoj. Do ĉu la junulara organizo paŭsas tiun “plenkreskulan” tiel bone ke ĝi eĉ same eraras pri la mon-elspezoj? Kompreneble la eraroj helpas ĉian E-organizon plibonigi, ĉefe TEJO-n, kiu estas survoje al plena maturiĝo kiel sendependa organizaĵo. Krome TEJO estas ŝajne la nura organizaĵo, kiu furis la unuajn paŝojn por liberiĝi de la tradicia agadmaniero de la E-movado; alidire, ĝi kvazaŭ deputas en la plenumado de socialaj agadoj.

Tamen la “plenkreskuloj” pridubas la aŭtonomion de la junuloj, ĉar “junuloj estas ĉiam junuloj”... kuraĝaj, emaj al mensa malfermiteco, sed ĉiuokaze mankaj je sperto. La libero implicas gravajn taskojn, danĝerojn kaj respondecojn... sed ankaŭ eblojn. Krizojn oni superas. La junularo estas la avangardo. Ĝia rolo estas alporti novan aliron, alfronti dogmojn kaj sentime entrepreni.

Se paroli pri dogmoj, tre bona ŝanco rompi unu el niaj dogmoj estis la propono kompensi la vivelspezojn de la TEJO-prezidanto, tiel ke li povu daŭrigi sian oficon. La propono pri la subvencio estis formale prezentita kaj... malaprobata, ĉefe pro financaj kialoj, sed ankaŭ ĉar ĝi estas kontraŭ dogmo de nia movado: oni devas labori kiel volontulo, tute senpage. Se temas pri necesaj oficistoj, salajro estas akceptebla, sed, se temas pri statuta direktoro, oni devas elturniĝi por vivteni sin. Oni diras, ke la junuloj devas unue vivi antaŭ ol ŝanĝi la mondon... tamen, se eblos ŝanĝi la mondon tuj, kial ne?

Do, sen subteno, nur la filoj de riĉaj familioj povus evoluigi la socion per agado sur la kampo de agado senprofitcela, sed riĉaj junuloj tre malofte havas tempon por noblaj idealoj, ĉar ĉio en nia socio stimulas ilin al konsumismo kaj al nur senfina batalado por sukceso en sia profesia kariero. Tio estas grava damaĝo, ĉar multaj neriĉaj junuloj estas tre lertaj kaj fruktodonaj personoj kaj estus tre utilaj al nia idealo. Fakte estas, ke multaj el ili fariĝas esperantistoj kaj donas siajn talentojn, tempon kaj energion al la evoluo de nia afero, sed ofte oni kabeas, pro la batalo por la vivo, dum multaj emeritoj ne bezonas vivteni sin kaj povas ja dediĉi sin al Esperanto multe pli ol gejunuloj,

kiuj plejofte studas aŭ devas labori, bedaŭrinde ofte eĉ ambaŭ.

Do gravas, ke ni enkonduku en Esperantujo novajn fundamentojn, kiuj permesu al ni havi sufiĉan monon por (se ne eblas pagi decan salajron) almenaŭ ebligi al la gejunuloj, kiuj ankoraŭ povas kaj volas dediĉi grandan parton de sia vivo al granda homa celo, tion fari kontraŭ kontetiga financa kompenco. Tre utilos ebligi al niaj gejunuloj sindediĉon plentempan al nia movado. Tamen mono ne kreskas sur arboj. Ja ekzistas programoj kiuj subtenas plurajn gejunulojn preskaŭ plentempe deĵorantajn por Esperantaj organizoj, sed tiuj programoj ĉefe alireblas nur en Eŭropo. Kio pri la gejunuloj en Afriko, en Azio, en la du Amerikoj kaj en Oceanio? Ĉu estas subvencioj por ĉiuj? Ne! Akiro de subvencioj kadre de eŭropaj programoj estas necesa, sed taŭgas por nur limigitaj projektoj. La tutmonda E-junularo ja bezonas novan modelon de agado. Do TEJO devas ĉesi sian kiel eŭropeca asocio. Pritrakti afrikanojn kaj gejunulojn el aliaj kontinentoj kiel helpopetantojn ne estas pozitiva sinteno.

Revene al la komenco de ĉi tiu artikolo, la financaj malfacilaĵoj de TEJO rezultiĝas ne nur de stumbloj pro manko de profesia strukturo, sed ĉefe pro alkroĉiĝo al tiu tradicia modelo de agado, kiu senvalorigas la entreprenemon, la pagan laboron, la kreon de ebloj por (duon)profesia agado fare de amaso da gejunuloj tra la tuta mondo. Perlabori iom da mono per Esperanto dum oni studas kaj sin preparas por la vivo estas nepro novaĵo enkondukenda en Esperantujo. TEJO kapablos ĉefmotori revolucion en la mondo, se ĝi ĉesos pensi kiel organizaĵo de eŭropa junularo por ekpensi kiel vera tutmonda esperantista junulara organizo. En Eŭropo, junuloj kiel Enric Baltasar ne havas sufiĉan monon permesantan plenan sindediĉon al Esperanto, sed oni havas bonajn lernejojn, oni ne malsatas, oni povas trovi laboron sufiĉe facile, kvankam la situacio en multaj landoj, kie ekzistas junuloj kiel la demisiinta prezidanto de TEJO, ja estas tute alia.

Do la rolo de TEJO nuntempe estas maturiĝi, kio signifas ankaŭ riski kaj sperti... por ŝanĝi la mondon per la kreo de nova modelo de agado por la esperantistoj, kiuj estas tre alkroĉitaj al multe da dogmoj kaj al sia komforta vivo. Esperantujo bezonas novajn fundamentojn kaj TEJO havas antaŭ si, kiel sendependa organizo, la ŝancon ekanĉi tiujn fundamentojn kaj fari revolucion.

HOMAJ RAJTOJ

Pri la rilatoj inter E-movado kaj homaj rajtoj

Fabrício Valle

Andreas Künzli estas tre polemika kaj senindulge severa je la kritiko pri la E-movado, kaj ofte li ne pravas. Aliflanke ni devas konsideri, ke li estas ĝisfunde kulturita kaj tre kompetenta pri la historio de Esperanto kaj alligitaj temoj.

Nu, fidele al la devizo de Heroldo, nome “Ni pripensu la mondon”, mi ekpitraktas ĉi-artikole ja diskutindan temon, nome la rilatojn inter Esperanto (kun ĝia movado) kaj la homaj rajtoj. Por tiu celo mi prenos kelkajn punktojn el artikolo de Andreas Künzli el <http://bit.ly/homajrajtoj-kunzli> kaj ĝin komentos, aldonante miajn proprajn ideojn kaj iom da kritiko pri lia pensmaniero.

Unua citaĵo el la artikolo:

“Kiel la gazetaro de diversaj landoj lastatempe raportis, la stato de la Homaj Rajtoj en la mondo draste malboniĝis en la pasintaj jaroj, praktike en ĉiuj landoj, en kelkaj pli, en aliaj malpli intense. Aktualan analizon de la stato de la Homaj Rajtoj en la mondo regule donas la ĉiujare aperanta Raporto de Amnestio Internacia, kiu pentras ŝokan bildon pri la lezado de la bazaj homaj kaj civitanaj rajtoj en la monda ŝtataro. Krom sennombraj krudaj kazoj, kiuj estas listigitaj en tiu impresa raporto, la homaro pli kaj pli suferas malrespektadon, ignoradon kaj lezadon de la homaj rajtoj ankaŭ en landoj, kiuj ĝis nun grandparte respektis la homajn kaj civilajn rajtojn, ekzemple Pollando kaj Hungario, por nomi du aktualajn eŭropajn ekzemplojn.”

Nu, en ĝeneralaj trajtoj, la aŭtoro montriĝas nescianto pri tio, ke malrespekto al la homaj rajtoj venas ne nur de la landoj cititaj de li. Tre ofte li prezentas la okcidentajn landojn kiel grandan bastionon de la homaj rajtoj, sed ni scias, ke tio ne ĉiam veras. Homaj rajtoj kaj demokratio estas ofte uzataj kiel argumentoj por enmiksiĝi en la internan vivon de malfortaj landoj kun la celo domini. Mi preferas pritrakti la temon sen alkroĉiĝemo al tio, kion la okcidenta gazetaro disheroldas. Alidire, senpartie (la okcidenta gazetaro havas partion, same kiel preskaŭ ĉiuj grandegaj entreprenoj sur la kampo de komunikado). Resume, se ni volas serioze pritrakti la temon “homaj rajtoj”, ni komencu de nia propra korto.

Cetere, interkrampe, ĉu ni povas revii pri estonta gazetaro bazita sur Esperanto kiel laborlingvo, regata de la ĵurnalistoj mem, en kooperativa sistemo aŭ io simila? Priparolante landojn kie oni malrespektas la homajn rajtojn, kiuj samtempe estas ĉiamaj temoj de reportaĵoj de la okcidenta gazetaro, inkluzive de la brazila gazetaro, Andreas Künzli skribas:

“En tiuj landoj aperis registaroj, demokratie elektitaj de la (ĉu malkontenta?) popolo, kiuj prezentas sin eksplicite naciismaj, ksenofobiaj kaj kontraŭ-liberalaj kaj kiuj kuiras sian propran supon por konservi la potencon (ĉar nur pri tio temas). Preskaŭ ĉiuj orienteŭropaj landoj kontraŭstaras akcepti rifuĝintojn el islamaj landoj kaj konstruas longajn kaj altajn murojn ĉe siaj limoj por protekti sin kontraŭ la timata amasa invado de rifuĝintoj el Sirio, Afganio kaj Afriko, kie la ĝenerala mizero estas senlima kaj neimagebla. Povas esti, ke la socioj en orienta Eŭropo havas seriozajn kialojn por rifuzi rifuĝintojn el tiaj landoj. Ne nur pro la milito, sed ĉefe pro ekonomiaj kialoj al (okcidenta) Eŭropo migras pli kaj

pli da homoj el orienta Eŭropo, el Afriko kaj Proksima Oriento, kie la koncernaj landoj riskas ankaŭ civilize dezertiĝi. Kvankam iliaj ĉelimaĵ bariloj en principo kontraŭas la spiriton de Eŭropa Unio, Bruselo ŝajnas toleri tiujn farojn, kiuj kontribuas al la protektado de la eksteraj limoj. Sed en la Mediteranea Maro dronis miloj da homoj, ĉar iliaj ŝipoj ne eltenis ilian transporton al la bordo de Eŭropo. Tio estas unika skandalo en la historio. Eŭropa Unio, la pacprojekto en si mem, riskas ne nur perdi sian kredindecon, sed ankaŭ disfali en sia konsisto, ĉar parto de la nova elito ŝajne ne plu interesiĝas pri Eŭropa Unio en la nuna formo, kiun la ‘perfidemaj’ angloj jam forlasis.”

Pri la supra citaĵo estas pluraj punktoj komentindaj, sed mi komentos nur du:

1. Ksenofobia sinteno estas civilizacia malsano, kiun per Esperanto ni povas helpi kuraci. Kiel, en praktiko? La tuta esenco de Esperanto kondukas al malksenofobia sinteno. Tion li diras per la jenaj vortoj: “La movado ne volas aŭ ne povas enmiksiĝi en la politikajn aferojn de la unuopaj ŝtatoj, ĝi almenaŭ serioze konsideru la problemojn de la homaj rajtoj kaj la etnismajn demandojn, ĉar tiuj temoj estas **esence kaj nedisigeble ligitaj kun la zamenhofaj ideoj kaj idealoj, la esperantismo kaj homarismo** (reliefigo mia).
2. Li asertas, ke “la ĝenerala mizero estas senlima kaj neimagebla” en landoj kiel Sirio, Afganio kaj en la afrika kontinento, sed ni povas ne nur imagi, sed vidi. Mankas ĝisfunda esploro de la radikoj de tiu mizero, militoj, puĉoj ktp. Multe da okcidentaj landoj kunlaboris por tiu draste malfacila situacio en tiuj landoj. Pri tio ni ne povas fermi niajn Esperantajn verdajn okulojn.

Pri la E-movado, jen unu el liaj regulaj kritikoj:

“... la problemo de la E-movado, kiu ĉiam havis grandan malfacilon toleri kaj elteni siajn kritikantojn kaj kontraŭulojn, kvankam ĝi senĉese predikadis toleremon, estas, ke ĝi estas ĉefe propaganda, turisma kaj amuziga.”

Maltoleremo ne estas ekskluzivaĵo de esperantistoj, kiuj unue estas homoj kiel ĉiuj aliaj. Ni ne postulu perfektecon de la esperantistoj. Aliflanke, li iomete pravas pri sia takso rilate la ĉefajn trajtojn de la E-movado, sed li neniam kapablis, almenaŭ laŭ mia vidpunkto kaj surbaze de tio, kion mi legis el lia verkaro, klarigi bone kial la E-movado estas tia, kia ĝi estas. Mi opinias, ke tio rezultas de historiaj faktoroj, kiuj povos ŝanĝiĝi. Cetere, bonvolu legi pri la enketo farita de Heroldo en Facebook, kies rezultoj estas parte komentataj en la rubriko Internacia Laborlingvo (p. 3 ĉi-numere). Heroldo planas regule analizi la kaŭzojn de la “problemoj” de la E-movado. “Problemo” estas inter citiloj ĉar fakte ne estas problemoj, ke la E-movado estis ĝis nun “ĉefe propaganda, turisma kaj amuziga”. La problemoj kuŝas en tio, ke la esperantistoj ankoraŭ ne klare komprenis, ke Esperanto **eniras sian 2-an grandan historian fazon**. Dum en la 1-a fazo la granda celo (brile plenumita) estis vivantigi “projekton de lingvo”, en la 2-a estas ne unu celo, sed pluraj, kaj ĉiuj estas ligitaj al la praktika aplikado de Esperanto sur la monda scenejo, kaj tio inkluzivas la aliron al tiklaj temoj kiel politiko, homaj rajtoj, naciismo kaj similaĵoj. Do ni plonĝu senhezite en tiun novan fazon de Esperanto. Heroldo jam plonĝis, kun la celo “pripensi (kaj pripensigi) la mondon”.

Heroldo
de Esperanto
Ni pripensas la mondon

Redakcia stabo

Redakcia Direktoro -
Fabrício Valle

Vic-Redakcia Direktoro -
Bručjo Kasini

Redaktoro - vakas

Kun-redaktoro -
Antonio Codazzi

Redakcia sekretario -
Andrej Pečenkin

Ĉefproleganto -
Roberto Pigro

Kolumnistoj

Internacia Laborlingvo (El la redakcio) – Scienca Heroldo (diversaj kunlaborantoj) – Jes Ja! (César Domeles) – Per/ Por Esperanto (Renato Corsetti) – Memorindaj esperantistoj (Xavi Alcalde) – Tra Esperantujo (Massimo Ripani)

Ĉi-numeraj kunlaborantoj

Rubén Fernández Asensio - Jolanta van Holstein - Joachim Verdin - José Tenório (enigmaj) - Trevor Steele

Fondinto

Teo Jung (1892 - 1986)
https://eo.wikipedia.org/wiki/Teodor_Jung

Grafikisto

Eric Kaji

Reta versio

www.heroldodeesperanto.club

Reta abonilo

www.heroldodeesperanto.com

Retadresoj

Redakcio
redakcio@heroldodeesperanto.com
Demandoj pri abono
abono@heroldodeesperanto.com

Naciismo, esperantismo kaj la postaĵo de naciistoj



Rubén Fernández Asensio

Lingvo-instruisto

En la lasta numero de *Heroldo*, A. Fabián Jiménez bedaŭre miras “kiel multe da esperantistoj apogas la naciismajn movadojn”. Ho tempoj, ho moroj! Kiel dekadencas Esperantujo! Tamen tiu “perfidio” estas nepra rezulto de la nunaj eksteraj vivkondiĉoj de nia movado. Li prave mencias ke “nuntempe pli kaj pli da homoj samideas kun tiuj estintaj esperantistoj, kiuj batalis kontraŭ la fortaj muroj de miljaroj inter la popoloj”, sed forgesas mencii, ke tiuj modernaj internaciistoj batalas per la angla lingvo kaj kontentas pri ĝi. Post la fina venko de la angla, kiam ĝi ne plu havas konkurantojn en la rolo de internacia lingvo, kiam ĉiuj, krom marĝenuloj kiel ni, jam akceptas, ke ĝi estas la nediskutebla perilo de internaciaj rilatoj, kiam ĝin uzas ne nur registaroj kaj diplomatoj, sed ankaŭ neregistaraj organizoj kaj amasoj da sinceraj kaj sindonaj bonfarantoj en siaj klopodoj plibonigi nian mondon, kiu sentas sian memestimon vundita de la angla kaj rebatas, ke ĝi ne estas neŭtrala, per harfendaj argumentoj konvinkantaj neniun? Nur furiozaj naciistoj kiel ni.

Sed esperantistoj estas strangaj naciistoj. Ilia naciismo, kvankam intensa, estas senkonscia kaj “banala”, kiel dirus Michael Billig. Estas vere ke, ĝenerale, naciismo estas kiel postaĵo: ĉiu havas unu, sed neniun vidas la propran; kaj tre ofte oni pretervidas ankaŭ la aliulan, ĉar ĝin kovras deca vesto el leĝoj, registaroj, diplomatoj, policoj kaj armeoj, farante kvazaŭ duan haŭton, ŝajne naturan kaj nerimarkeblan. Nur la nuda mizerulo ŝajnas havi postaĵon kaj estas mokata pro tio. Tamen esperantistoj estas alienataj aŭ memfremdigataj en preskaŭ marksisma senco, ĉar ili, kiel puritanoj pri nudeco, pli ol aliaj hontas pri naciismo kaj subpremas siajn plej profundajn sentojn al la aliaj kaj al si mem, kaŝante ilin sub pruda ŝajno kaj pretendante doni al aliaj lecionojn pri ilia riproĉinda ŝovinismo. Tiusence, la esperantistoj similas al movado de tiel nomataj “eks-gejoj”: ni ne nur estas enŝrankigitaj naciistoj, sed ankaŭ atakas tiujn, kiuj pli libere esprimas sentojn de ni rigardatajn hontindaj. Kaj, kiel okazas al eks-gejoj, ni mensogas nur al ni mem kaj konvinkas neniun. Oni facile rimarkas la kontraŭdiron inter nia kritikado de naciismo kaj nia fiera rifuzo de la angla. Dum esperantistoj ne konscios sian naciismon, niaj penoj disvastigi Esperanton estos ridinde senefikaj.

Oni ne kredu, tamen, ke tiuj naciismo kaj memfremdiĝo estas novaj fenomenoj, ĉar ili datiĝas de la origino mem de nia movado kaj estas bazitaj sur legendoj kaj eĉ rektaj trompoj, disvastigitaj ankaŭ de Zamenhof mem. Danke al la biografioj de Holzhaus, Maimon kaj Korĵenkov, nun estas bone sciata ke li estis pioniro de cionismo, sed oni ankoraŭ kredas ke, kiel Paŭlo sur la vojo al Damasko, ial kaj iam li vidis la lumon, forĵuris naciismon kaj konvertiĝis al sennaciismo kaj tut-



Pli ol unu miliono da homoj kunvenis en Barcelono, Hispanio, por partopreni manifestacion postulantantan sendependecon por Katalunio, la 11-an de septembro 2012

monda frateco. Sed ankaŭ tio estas legendo.

En 1901 li dissendis al malmultaj judaj intelektuloj la ruslingvan anoniman broŝuron *Hilelismo*, kiu ĉiu esperantisto devus legi. Tie li skribis: “Oni povas esti popolo sen politika memstareco, sen tero, sen ĉio, kion vi volas, sed oni ne povas esti popolo sen lingvo, ĉar tio ĉi estus rekta logika kontraŭparolo” (p. 54). Eble ĉi tiu estas nur lia persona difino de “popolo”; sed ankaŭ tiu de Fabián Jiménez estas nur lia. Kiel diris Humpty Dumpty en *Trans la spegulo*: “Kiam mi uzas vorton, ĝi signifas precize kion mi volas ke ĝi signifnu – nek pli nek malpli. La demando estas kiu estu la mastro – jen ĉio”.

Ankaŭ en *Hilelismo* Zamenhof proponis solvon de la juda demando per reformo de la juda religio kaj alpreno de nova “arta” lingvo kiel genta lingvo. Se tiu lingvo, samtempe nacia kaj “neŭtrale homa”, ne estis Esperanto, ĝi tamen konkurencus kun ĝi por la rolo de tutmonda lingvo: “Nia idealo ĉiam restos efektiva kunfandiĝo de hebreoj kun popoloj de la tuta mondo, ĉar ni estas konvinkitaj, ke por dissemiata hebreco tra la tuta mondo tio ĉi estas sola kaj la plej bona eliro kaj en tiu ĉi kunfandiĝo, el kiu devus eliri io granda kaj sava por la tuta homaro, enestas tuta misio de la hebrea popolo” (p. 62). Kiam, tion leginte, juda esperantisto Abram Kofman plendis kontraŭ la uzo de Esperanto kiel Troj-ĉevalo de ia juda imperiismo, Zamenhof sin esprimis per la famaj vortoj: “Lingvo internacia fortikiĝos por ĉiam nur en tia okazo, se ekzistos ia grupo da homoj, kiu akceptus ĝin kiel sian lingvon familian, *heredan*. Jes, per sia memkontraŭdira propono pri “kreo de neŭtrala popolo”, Zamenhof pretis foroferi la neŭtralecon de Esperanto, por ke lia gento ĝuu superecon en internaciaj rilatoj. Nur pro la malvarma akcepto de la juda intelektularo, kiu nek fidis lian utopian ŝovinismon nek volis foroferi siajn proprajn lingvojn jidan kaj hebrean, Zamenhof devis

revortumi sian hilelismen kiel homaranismon kaj malfermi ĝin al nejudoj, kun la celo arte krei al si mem novan genton, same kiel antaŭe li arte kreis novan lingvon.

Danke al Korĵenkov estas nun sciata, ke, en sia parolado en la 2-a Universala Kongreso en Ĝenevo, Zamenhof intencis publike elpaŝi kun sia nova kredo kaj legi la Deklaracion de Hilelismo, sed fine malkuraĝis, tiel ke la enkonduka koncepto pri la “interna ideo” de esperantismo restis malpreciza kaj ĉiel interpretebla, ludilo por novaj Humpty Dumpty. Nun ni scias ke ĝi ne estis alvoko por “kontraŭbatali naciismon”, kiel pretendas Fabián Jiménez, sed por fondi “neŭtralan popolon” aŭ supernacian eliton, kvazaŭ kreo de plia gento solvus la problemon pri intergenta diskriminacio. La fiasko de lia propono ne estas surpriza: alvokoj al kosmopolitismo kutimas esti ne nur ekskluzivaj kaj elitismaj, sed ankaŭ naivaj; se ili estus transmetitaj al la problemoj pri rilatoj inter seksoj, tiuj alvokoj simile postuladus ke, por forigi malpacon kaj diskriminacion inter viroj kaj virinoj, la homaro fariĝu senseksa. Sed, dum esperantistoj ne konos sian historion kaj sin mem kaj papage ripetos la eluzitajn sloganojn per kiuj ili mem varbiĝis, ili faros naivajn proponojn kaj miros, ke ili estas malatentataj.

Ĉu, malgraŭ ĉio ĉi, esperantismo estas savinda? Mi opinias ke jes, sub la kondiĉo ke oni ĉesu prisilenti la pozitivajn efikojn de naciismo: en nia okazo, la konscion kaj la defendon de lingva justeco. Sed tio estas kiel provi konvinki puritanon, ke sekso ne estas malpuraĵo, kaj ne estas la celo de ĉi tiu artikolo. Ĝia intenco estis refuti la kontraŭkatalunajn antaŭjuĝojn de la aŭtoro de la artikolo aperinta en la 4-a numero de *Heroldo*, pri la afero “sendependiĝo de Katalunio”, sed lia profunda nescio pri esperantismo ne estis preterlasebla. Pri Katalunio, eble ni daŭrigu en venonta artikolo.



Zamenhof pretis foroferi la neŭtralecon de Esperanto


INTERNACIA LABORLINGVO La praktika aplikado de Esperanto tra la mondo

Enketo montras kion la esperantistoj volas de Esperanto

Heroldo de Esperanto kreis enketon en Facebook kun la jena demando: “Kio Esperanto estas por vi, en la praktiko? Bonvolu komenti vian respondon”.

Nu, la opcioj estis sep kaj eblis elekti unu aŭ pliajn opciojn. Pli ol 150 esperantistoj partoprenis ĝin. La grafikaĵo montras la rezulton de la enketo, surbaze de la respektivaj voĉoj por ĉiu opcio.

La fakto, ke “Lingvo por amikiĝo”, “Hobio” kaj “Tempopasigilo” kune ricevis 367 voĉojn, montras interalie, ke Esperanto ankoraŭ ne estas ĝisfunde ligita al la rekta praktika flanko de sia potencialo, sed,



se iam ni havos 100 milionoj da E-parolantoj, tio estos tre bona situacio por la 2,74% da esperantistoj, kiuj deklaris, ke por

ili Esperanto estas “lingvo por perlabori monon” (libro-merkato, E-turismo, vendo de esperantaĵoj, E-eventoj, E-kursoj, apoj ktp).

Ankaŭ bona situacio por tiuj, laŭ kiuj Esperanto estas “literatura lingvo”, ĉar merkato kun 100 milionoj da homoj signifus pli ol 10 milionojn da **fidelaj legantoj**, kaj ne mankus grandaj eldonejoj interesataj fosi tiun merkaton. Por tiuj, kiuj deklaris, ke temas pri “lingvo por turismumi”, ankaŭ ne mankus diversspecaj skemoj por turismado, de profesia merkato al alternativaj skemoj, ekzemple sur la kampo de sociala turismo.

La nombro de esperantistoj agantaj sur la kampo de “faka laborlingvo” kaj “universitata stud-objekto” (ĉirkaŭ 5 milionoj) certe produktos multe da bonaj rezultoj.

La malmultaj personoj por kiuj Esperanto estas “neniu el la opcioj” estas nekomentebla, sed certe io bona rezultos el tiuj.

Nu, ĉar 21,61% deklaris, ke Esperanto estas “lingvo por ŝanĝi la mondon”, ni havas preskaŭ 22 milionojn da homoj, iel ajn agantaj aktive por tiu celo. Bona scenejo por neregistaraj organizaĵoj, kiuj adoptos Esperanton kiel laborlingvon por specifaj celoj.

Ĉu tia estos la estonteco de ĉiuj E-asocioj, kies celoj nun estas nur “diskonigi kaj instrui Esperanton”?

Ni promesis aperigi ĉi-rubrike la plej interesajn komentojn, sed tion ni faros en la venonta numero.

INTERVJUO

JOLANTA VAN HOLSTEIN

Ne per vortoj, sed per faroj ni povas plej efike konvinki pri la taŭgeco de Esperanto

Jolanta van Holstein naskiĝis en Slupsko, Pollando, kaj magistrigis pri hortikulturo ĉe la Universitato de Vivoscienoj de Poznano. Ekde 1990 ŝi loĝas en Nederlando kie ŝi kunlaboras kun grandaj eksport-entreprenoj pri floroj kaj hortikulturo. Pro tio ke ŝi scipovas multajn lingvojn (la polan, la anglan, la germanan, la nederlandan, la rusan kaj kompreneble Esperanton), en la jaro 2011 kreis la traduk-entreprenon

Multi Modis Taalservice, kiu proponas, krom la memkompreneblan tradukservon, ankaŭ lingvan subtenon kaj konsultservon por nederlandaj entreprenistoj. Ekde kiam ŝi esperantistiĝis en 1981, ŝi estis tre agema en nia movado. Ŝi volontulis dum la 72-a UK en Varsovio en 1987. De la sekva jaro ĝis 1990, ŝi estis prezidantino de la Esperanto-klubo de sia naskiĝurbo. Depost la jaro 2013 ŝi estas estraranino kaj

sekretario de Internacia Esperanto-Instituto en Hago, kiu estas vigla kaj agema organizo: fakte ĝi aranĝas libroservon, instruadon kaj Esperanto-renkontiĝojn, evoluigas materialon por Esperanto-instruado, eldonas en kaj por nia lingvo, bontenas kontaktojn kaj interŝanĝas informojn kun samideanoj el la tuta mondo, kaj partoprenas la projekton de komputika lingvistiko nomitan *Alpazoro*.

Fabrício Valle kaj Antonio Codazzi

redakcio@heroldodeesperanto.com

Fabrício Valle - **Ni parolu unue pri "Ne flagoj, sed agoj", devizo kiun vi uzis por stimuli agadon dum la Zamenhofjaro ĉe Unesko. Kio pri la etato de la faritaj agoj tra la tuta mondo?**

Fakte mi lanĉis la devizon pro profunda seniluziigo pri la – sendube bonintenca, sed tute ne efika – agado de multaj samideanoj. Mia opinio la svingado per Esperanto-flago, agitaj filmoj montrantaj grupojn de samideanoj dum aranĝoj aŭ surstrate – vestitajn per verdaj vestoj, kiantajn pri paco kaj montrantajn Esperanto-simbolojn – sen klara mesaĝo ne helpas al la disvastigo de Esperanto, eĉ kontraŭe ĝenas la formadon de ĝusta bildo pri Esperanto. Por homoj kiuj ne havas pli bonan ideon sufiĉas lerni bone kaj uzi la lingvon, por montri ke ĝi ekzistas kaj utilas.

Aliflanke pri esperantistoj, kiuj faras la plej valoran laboron, oni aŭdas malmulton. Mi atendas ankaŭ pli kaj pli da Esperanto-aranĝoj kaj iniciatoj, direktitaj al neesperantistoj. Pri tiaj ideoj mi esperis aŭdi pli dum la Zamenhofjaro 2017.

Persone mi faris kelkajn agojn dum la Zamenhofjaro 2017: en aprilo 2017 mi faris prelegon pri Esperanto-por membroj de Asocio de Internaciaj Entreprenistoj loĝantaj en Nederlando, en julio mi prelegis pri E-movado en Nederlando kaj Pollando en mia naskiĝurbo Slupsko kaj partoprenis la oficialan malfermon de la Esperanto-sekcio en la urba biblioteko. Sekve de tiu festa okazintaĵo, miaj amikoj esperantistoj okazigis multajn Esperanto-kursojn en mia urbo, kiu havis iam tre viglan E-klubon, kun 120 membroj. Esperanto revigligis en Slupsko, ankaŭ danke al la proklamo de la oficiala festado de la Zamenhofjaro en la urbo, fare de la urba konsilario, post kiam oni rifuzis tion en Bjalistoko.

En septembro mi prelegis pri Esperanto en Hago por grupo de lokaj entreprenistoj, ni kune vizitis

Internacian Esperanto-Instituton en Hago, kun ampleksa E-biblioteko kaj arkivo pri agado de Andreo Cseh.

Krome mi daŭre instruas Esperanton per Skype al kelkaj junuloj en Pollando, Orienta Timoro kaj Brazilo.

Fabrício Valle - **Se paroli pri la uzo de nia lingvo por montri ke ĝi ekzistas kaj utilas, ŝajnas, ke ni ne havas multon plian por montri ol riĉan literaturon, kulturen vivon, movadajn iniciatojn memcentritajn al la Esperanto-movado mem. Alivorte, vi pravus, asertante ke mankas aranĝoj kaj iniciatoj direktitaj al neesperantistoj, sed tio ne sufiĉas. La mondo bezonas Esperanton sed la esperantistoj, ĝenerale, estas tre kontentaj pri si mem. Escepte de interesaj iniciatoj kiuj montras novigemon, ĉu ĉe TEJO, ĉu ĉe tre malmultaj fakaj asocioj, kiel UMEA, Esperantio estas dezerto de agado en kiu Esperanto aperas kiel memcelo. Kiel rompi tiun muron de inerteco?**

Jes, ĝuste. Ŝajnas, ke malmultaj esperantistoj vere serĉas kontakton kaj kunlaboradon kun la organizaĵoj ekstere de Esperantio. Mi ne sukcesas malkovri la kialon, tial mi lasas min influi de la opinioj de iuj, kiuj sugestas, ke multaj esperantistoj sentas sin bone en la E-hierarkio pro postenoj kaj titoloj, kiujn oni ne sukcesis akiri en alia (profesia) agado. Tial abundas E-prezidantoj, kiuj ne parolas bone Esperanton, kaj moŝtuloj, kiuj distingas sin mem per premioj kaj prestiĝaj lokoj. Tamen oni ne zorgas pri diskonigado de Esperanto kaj pri prezentado al la mondo de la avantaĝoj de Esperanto. Kaj la avantaĝoj abundas, same kiel la ebloj prezenti ilin. Mi multe kaj pli profunde lernas kompreni la mondon kaj ekscias pli pri interesaj por mi internaciaj temoj nuntempe danke al Esperanto. Grandegan kaj gravegan rolon ludas en tiu procezo artikoloj kaj mesaĝoj de Esperanto-fakuloj. Mi pensas, ke taŭgus krei profesiajn paĝarojn,

“ Kvalito estas subtaksata koncepto en Esperantio

kie Esperanto estus baza lingvo, per kiu oni tradukus la artikolojn al naciaj lingvoj. Mi pensas ĉefe pri sciencaj paĝaroj, sed ankaŭ pri novaĵpaĝaro. Imagu, se ekzistis E-novaĵpaĝaro, kie aperus informoj pri mondaj okazintaĵoj, danke al la kontribuo de seriozaj esperantistoj. Esperantistoj estas ĉie, ili do povas rapide liveri lokajn novaĵojn pri lastaj gravaj okazintaĵoj, kiuj skuas la tutan mondon, sed pri kiuj mankas detalaj aŭ profundaj sciigoj. Ĵurnalistoj el la tuta mondo bezonas ofte multe da tempo por atingi la lokojn kie ekzemple okazis grava akcidento, dum lokaj esperantistoj povas ĉeesti pli rapide tie. E-novaĵpaĝaro povus havi pli rapide fidindan (foto)raporton. Imagu, se la Esperanto-novaĵpaĝaro estus citata mondscale de plej gravaj novaĵagentejoj! Pro granda dispartigo de nunaj iniciatoj oni ne plu kapablas vidi la tuton. Kvalito estas subtaksata koncepto en Esperantio. Ankaŭ kvalita internacia muziko kaj arto povus helpi disvastigi lingvon internacian. Indus investi en profesiaj artistoj kaj subteni tiujn, kiuj nun mem klopodas finatingi publikan atenton.

Mi pensas, ke gravan rolon en la rompo de la muro povus ludi la Universalaj Kongresoj. Dum UK, kiam kuniĝas homoj el multegaj landoj kaj kulturoj, kiuj parolas unu lingvon, oni povas pli facile serĉi kontakton kun neesperantistoj kaj montri al ili kio okazas inter la muroj de la kongresejo kaj inviti al kunlaboro. Universala Kongreso de Esperanto kaj ĉiu Esperanto-aranĝo devus havi mesaĝon por la mondo, ne por la manpleno de partoprenantoj aŭ ĝenerale esperantistoj.

Timtremigaj estas bildoj kaj raportoj de multaj Esperanto-renkontiĝoj. El ĉiuj kongresoj, kiujn mi partoprenis ĝis nun, mi pleje ŝatis la 101-an UK-on en Nitra. La subteno, engaĝiĝo kaj ĉeesto de la urbestro dum aranĝoj aldonis prestiĝon al la kongreso. Sed la organizantoj ankaŭ lerte zorgis por ke la aranĝoj, koncertoj, teatraĵoj okazu en la centra placo alirebla por ĉiuj. Multaj loĝantoj kaj turistoj partoprenis ilin kaj tre aprezis la organizadon. La komuna kongresa parado tra la centro de Nitra (jes, kun flagoj kaj E-simboloj!) estis belega manifestacio de ĉiuj esperantistoj kaj dankesprimo al la loĝantoj pro gastemo kaj afableco.

La problemo estas ke multaj (ofte ĉiujaraj) partoprenantoj de kongresoj ne parolas la lingvon. Ankaŭ tiun E-fenomenon mi neniam kapablis kompreni. Kabe diris, ke Esperanton plej necese devas lerni la esperantistoj mem, kaj Kabe pravis.

Fabrício Valle - **Se paroli pri investo en profesiaj artistoj kaj profesiigo de diversaj aspektoj de la E-movado, ŝajnas, ke la E-movado ne havas la strukturon kaj la rimedojn por iniciatoj, kiuj postulos pli ol bonvolemon, iom da libera tempo por Esperanto kaj idealon en la kapo. Ĉu ne jam estas horo pensi pri novaj labormanieroj, novaj strukturoj, novaj movadaj direktivoj? La E-movado ne povos multon fari per nur volontula laboro. Endas profesiigi la tutan movadon samtempe ne rezignante pri la volontula laboro. Kio mankas, por ke la esperantistoj povu pli vigle kaj funde evoluigi la praktikan flankon de Esperanto?**

Ĝenerale mankas la ideo pri la estonteco, profesia alpaŝo kaj lertaj gvidantoj. Mankas ankaŭ ne nur rilato kun eksteraj organizaĵoj, sed precipe kunlaborado ene de la movado, kvazaŭ mankus komuna celo. Ekestis konsiderinda dispartigo de intereso, homoj laboras por propraj profito kaj gajno, forgesante la



superajn celon kaj taskon de la movado. Tute ne miriga afero, ĉar ja ni ĉiuj bezonas enspezojn, kaj oni ne povas fari ĉion volontule. Sed pripensinde estas, ke tiaj profituloj ne kontribuas grave al la supera celo. Ĉu, por kompreni tion, necesas redifino aŭ rememorigo de la komuna supera celo? Se oni klare scias kion oni volas atingi kaj kien oni volas iri, oni facile povas trovi rimedojn kaj fortojn kaj oni klare vidas, al kiu tiuj rimedoj oni devas doni. Esperantio bezonas renoviĝon: novajn strukturojn, novajn labormanierojn kaj novan pensmanieron. Multo devus ŝanĝiĝi. Ne eblas per la sama scio kaj agado atingi alian rezulton. Mi pensas tamen, ke por multaj esperantistoj ŝanĝoj ne konvenas, ĉar por ili ŝanĝo signifus minacon.

Fabrício Valle - **Nu, ni provu difini tiun superan celon. Unue, ĉu ni parolas pri la supera celo de Esperanto aŭ de la Esperanto-movado? Kiel vi difinus ĉiujn trajtojn de tio?**

Mi parolas pri supera celo de la E-movado kaj de ĉiu esperantisto. Mia gvidilo pri la supera celo estas la pola versio de la Unua Libro: en ĝi mi trovis ne nur respondojn, sed mi ĉerpas ankaŭ inspiron por mia E-agado. Zamenhof metis en la Unua-n Libro-n ne nur raciajn klarigojn pri sia lingvo internacia, sed ankaŭ ĉiujn siajn emociojn, kiuj profunde tuŝas min ĉiufoje denove kiam mi relegas la libron. La Unua Libro enhavas ĉiujn argumentojn



kaj pledojn por Esperanto. Mi opinias, ke oni ne bezonas elpensi kaj presi novajn varbilojn: sufiĉas traduki al naciaj lingvoj la Unua-n Libro-n kaj disdoni ĝin. Ĝi estas la plej bona kaj la plej alparoliga varbilo por Esperanto kiun mi konas. Zamenhof montris per ĝi sian genion. En 1887 li uzis merkatan strategion je la nivelo de la 21-a jarcento por diskonigi sian verkon. Sur la unua paĝo de la libro videblas la frazo: "Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nur nomi ĝin tia." Zamenhof humile kaj modeste petas atenton kaj aktivan helpon de la tuta homaro por sia verko, kiu kostis al li multe da tempo kaj sano. La celo estas do tutmondigi la lingvon. Tio estas la tasko de la E-movado kaj de ĉiu esperantisto.

Fabrício Valle - Bonvolu paroli iomete pri vi mem. Vi estas polino, kiu delonge loĝas en Nederlando, parolas plurajn lingvojn kaj ofte vojaĝas, ankaŭ pro via profesia laboro. Kiom la nuna Eŭropa movado estas skuata de la nuntempaj okazaĵoj en via kontinento, rilate politikon, enmigradon ktp? Ĉu dum viaj vojaĝoj vi pli klare vidas la situacion tra Eŭropo?

La nuna eŭropa movado estas, mia opinie, tre inerta. Mi ne rimarkis ĝis nun fare de iu E-organizaĵo iun ajn movon, kiu estu klara reago je la nunaj eŭropaj disvolviĝoj. Kiel polino mi ege zorgas pri la situa-

cio en Pollando. La nuna politika situacio en Pollando estas malbona, kaj estos tragike, se la ŝanĝiĝo de la nuna registaro ne okazos tre rapide. La aŭtoritata pola registaro terure dividis la polan nacion kaj instigas polan naciismon. En nuna Pollando ne estas loko por homoj el aliaj kulturoj. Mankas ankaŭ subteno por iniciatoj kiuj ne akordiĝas kun la politiko de la nuna registaro. La klimato por Esperanto en Pollando estas nun eksterordinare malfavora. Mi atendas unue pozitivajn politikajn ŝanĝojn en Pollando. Se la situacio ne ŝanĝiĝos, ekzistas minaco, ke Pollando eliros el Eŭropa Unio kaj fariĝos senamika "insulo". Mi ne vidas rolon por lingvo internacia en izolita lando, kies registaro parolas lingvon de malamo kaj venĝo.

Mian esperon por la estonto de Esperanto mi ĉerpas nuntempe nur el la individua agado kaj el iniciatoj de miaj amikoj esperantistoj.

En Nederlando la lingva klerigado estas bona kaj sufiĉe altnivela: ĉiuj lernas kaj uzas la anglan lingvon, jam ekde la baza lernejo. La angla estas en Nederlando la plej uzata lingvo en internaciaj rilatoj. Diri, ke Esperanto povas pli bone plenumi tiun rolon, vere ne sufiĉas. Ne per vortoj, sed per faroj ni povas plej efike konvinki pri la taŭgeco de Esperanto.

Dum miaj profesiaj vojaĝoj tra Eŭropo mi neniam hazarde trovas iun signon pri Esperanto. Tio estas nur pruvo pri kiel forestanta estas Esperanto. Pro mia laboro mi ĉefe

vojaĝas al landoj, kies lingvojn mi bonege regas, mi do ne spertas tie lingvan baron. Sed mi rememoras, kiam en Francio dum la 100-a UK ni provis mendi manĝaĵon en restoracio en Lillo kaj havis problemojn pri interkomunikiĝo kun cetere tre bonvolema kaj vere afabla juna kelnero. Li tre mankhave parolis la anglan kaj neniu el ni parolis la francan. Poste mi ekmemoris, ke la organizantoj menciis, ke oni tradukis menuon en diversaj restoracioj al Esperanto. Mi do demandis la kelneron, ĉu mi povas ricevi la Esperanto-menuon. La kelnero rigardis min iom mirigita kaj konfuzita, kaj fakte eĉ iom amuziĝinta pri mia "stranga demando". Li ne sciis, ke la menuo estis alirebla en Esperanto, sed iris demandi la ĉefon kaj efektive revenis kun E-menuo. Vi povas imagi mian ĝojegon pro tiu solvo de la problemo. Al poloj ja aplikiĝas tre forte la esprimo "hungry, angry": "Polo malsata, polo kolera."

Antonio Codazzi - Kiom influis (aŭ fiaskis) pri la situacio en Pollando la agmaniero de Eŭropa Unio... aŭ, pli bone dirante, la reago al ĝi? Krome, nia movado kaj nia komunumo ne kapablis imponi almenaŭ kiel modelo por la homaj rilatoj, kaj do ĉu tiu fiasko, laŭ vi, estis decida en la estigo de du neelteneblaj sed komunaj pozicioj, t.e. internacia trudemo kaj nacia solipsismo?

Mi kun teruro sekvas la disvolviĝon en Pollando kaj la agadon de homoj ligitaj kun la nuna registaro, kiuj nomas sin ununuraj patriotoj. Pollando fariĝis membro de Eŭropa Unio en la jaro 2004. EU estas geopolitika kunteksto donanta al Pollando sekurecon, ĝi estas libera merkato, danke al kiu polaj firmaoj povas konkurenci en tuta Eŭropo, ĝi estas fonto de konstruo de moderna infrastrukturo en Pollando. La nuna registaro sub tiuj ŝajnaj patriotaj devizoj volas ĉion ĉi detrui. Mi, kiel polino kaj eŭropanino, simple ne komprenas tion, sed tio vekas mian profundan kontraŭon kaj timon.

La pola nacio apartenis dum jaroj al la plej poreŭropaj nacioj. Nun Pollando estas en profunda konflikto kun Eŭropa Unio kaj la pola registaro provas konvinki polojn ke EU estas malbona. Ĝi parte sukcesas pro la historie klarigebla "alergio" de poloj al enmiksado de eksteraj fortoj en la internajn aferojn de la ŝtato.

Pro neaplikado de eŭropaj reguloj i.a. koncerne la migradan kvoton, minacas nun Pollandon ne nur financaj sankcioj, sed ankaŭ ekskludo el la kundecidaj procedoj kaj perdo de la voĉo kiel membro-lando.

La nuna pola registaro kontraŭagas Eŭropan Union, kiu ja estas nia aliancano! Ĉu vere iu povas kompreni tion? Mi ne sukcesas kompreni tion. Kiel mi jam menciis antaŭe, la pola nacio estas tre dividita, la plejmulto (se kredi statistikojn) subtenas la agadon de la registaro, ĉefe pro la alloga socia programo. La E-movado en Pollando estas ankaŭ dividita kaj fakte marĝena kaj nevidebla. Sen forta komuna mesaĝo kaj sen klara vidpunkto oni ne povas imponi kaj influi la situacion.

Multaj nun uzas la metodon "mise-bise", kaj pensas ke la vento alportos scion/konon.

“

La nuna eŭropa movado estas, mia opinie, tre inerta

Antonio Codazzi - Vi rimarkis dividon inter la polaj esperantistoj pri tio. Kiel sukcesas kielkaj E-movadanoj akordigi la internan ideon de Esperanto kun izolismo?

Maniero de pensado kaj traktado de problemoj estas ĉiam individua kaj dependas de ies personeco. Se iu homo estas malfermita, kreema, sociema (... nomu iun ajn econ), li aŭ ŝi aplikas tion ankaŭ en sia Esperanto-agado. Esperanto iamaniere allogas kaj altiras homojn, mi diru "alternativajn", por ne ofendi iun ajn. Sed ni ne povas nei, ke inter esperantistoj troviĝas relative multe da homoj, kiuj "pensas alie", "agas alie", "amas alie". Tiuj homoj sentas sin izolitaj, ne akceptitaj, kaj ofte trovas komprenon kaj la eblon paroli pri siaj ideoj kaj sia orientiĝo en Esperantio. Kaj tio estas bona signo. Esperanto estas por ĉiu. Sed mi supozas, ke ĝuste pro tio, ke Esperantio estas por tiuj homoj kvazaŭ sekura haveno, ili ne havas bezonon pri kontakto kun la "ekstera mondo".

La interna ideo estas de multaj homoj komprenata tro laŭvorte (interna - ena). Zamenhof, en sia nekredbla idealismo, kredis, ke nacioj pere de komuna lingvo povus fariĝi unu familio. Zamenhof parolis pri la tuta homaro.

Grandan rolon en tiu procezo Zamenhof vidis por literaturo, kiel portanto de idealoj, konvinkoj, streboj, instruado. Tradukitaj al unu komuna, tutmonda lingvo ili estus samgrade alireblaj kaj kompreneblaj por ĉiu homo sur nia planedo. Kia riĉeco!

Persone mi dediĉis mian tempon al la lernado de 7 lingvoj. Zamenhof pravis, asertante ke, se oni povus paroli nur la gepatran (gepatrajn) kaj internacian lingvojn, oni pli bone povus esprimiĝi kaj la lingvoj mem pli disvolviĝus kaj pliriĉiĝus. Zamenhof nomas lingvon "la ĉefa levilo de civilizacio".

Esperanto bezonas homojn, kiuj helpu trovi rimedon por venki la indiferentecon de la mondo kaj sukcesu trovi konvinkan kialon por uzi la lingvon tutmonde, kaj ne nur en malgrandaj rondetoj de entuziasmluloj. Zamenhof petis ke ĉiu faru laŭeble tion, kio eblas por disvastigi la lingvon. Ni faru tion kiel eble plej bone kaj utile subtenu lin en lia revo: tutmondigo de la lingvo internacia. Ni ne estu indiferentaj, ni ne silentu, ni uzu ĉiun okazon por paroli pri Esperanto. Ĉar, por ke malbono regu kaj triumfu, sufiĉas indiferenteco de bonaj homoj.

Antonio Codazzi - Komprenoble, per lingvo facile lernebla kaj komprenebla, oni povas cirkuligi ideojn, informojn kaj novaĵojn. Nia cerbo estas iom kiel komputilo: sen informoj ĝi ne povas "labori". Tamen mi rimarkas ke en nia Eŭropo - mi

kiel vi estas eŭropano - kaj en la tuta mondo ĝenerale la informoj estas ofte kontraŭdiraj kaj eĉ propagandemaj... Ne gravas per kiu lingvo tiuj estas dissendataj. Kion vi opinias pri tio? Mi kaptos la okazon por peti vian opinion ĉefe pri la timoj de Pollando orientflanke. La gazetaro asertis en mia lando (Italio) ke Pollando timas Rusion, sed en aliaj nacioj asertas ke pola timo adreŝiĝas ververe al ekstrem-dekstrema Ukrainio. Ĉu la ordinara homo havas la eblecon koni iom da realeco?

Jes, mi plene konsentas, ke informoj kiuj atingas nin estas ofte kontraŭdiraj, mensogaj aŭ propagandemaj. Sed parolante pri novaĵpaĝaro mi celas informadon pri faktoj. E-novajageto povus distingiĝi per informado pri faktoj, sen spekulacioj aŭ pripensaĵoj.

La fakto estas, ke la 17-an de julio 2014 la flugo MH17 (Malaysia Airlines) estis trafita kaj malsuprenigita super orienta Ukrainio. La aeroplano estis survoje el Amsterdamo al Kuala Lumpur. En la aviadilo troviĝis 283 pasaĝeroj (inter ili 196 nederlandanoj) kaj 15 skipanoj. La afero daŭre estas aktuala en Nederlando, la parencoj de la mortintoj post pli ol 3 jaroj ne ricevis ankoraŭ respondojn kaj klarigojn. Tiujn povas doni nur homoj, kiuj troviĝis tiutempe surloke, ne nur la kulpuloj, sed ankaŭ atestantoj. Sekura, detala kaj sendependa esplorado povus helpi kolekti la faktojn, evidentajn kaj pruvojn. Komuna lingvo povus helpi al internaciaj esploristoj interkompreniĝi kaj ebligus ankaŭ interparolojn kun lokuloj, kiuj estis atestantoj.

Mi mencias tiun fatalan akcidenton, ĉar ĝi estis turniĝo en Nederlando pri oficialaj rilatoj kun Rusio, sed ankaŭ ekkonsciiga kaj ekkompreniga ŝanĝiĝo. Nederlandanoj ekkonsciis la danĝeron flanke de Rusio, kiun ni - poloj - jam konis kaj spertis en nia historio.

Pollando timas Rusion, ĉar Pollando estas ĝia najbara lando kaj do la plej facila celo. En Pollando (cetere ĉe la limo de mia naskiĝurbo Slupsko) troviĝas NATO-ŝildoj kontraŭ misiloj kaj posteniĝas usona militistaro. Estas do tute kompreneble, ke, dum la tuta mondo, aŭ almenaŭ Eŭropo, kiel plej grandan danĝeron indikas islaman terorismen, Pollando pleje timas la politikon de Putin. Plejmulto de poloj opinias, ke la situacio en la regiono stabiligis, se Ukrainio integriĝus kun la Okcidento. Malgraŭ tio, ke Pollando kaj Ukrainio havas ankaŭ komplikajn komunan historion, Pollando staras en tiu ĉi malfacila tempo ĉe la flanko de Ukrainio.

Ĝuste en Pollando oni ĉiam manipulis kaj misinformadis. Mi devis lerni la veran historion de Pollando pere de mia patro kaj de libroj eldonitaj "subtere" kaj oficiale malpermesitaj, ĉar niaj lernolibroj enhavis mensogojn kaj prisilentojn. Por mi vero, justeco kaj libereco de esprimado estas tre gravaj valoroj. En 1981, kiam tuta Pollando solidare ekstaris kontraŭ la komunisma diktaturo, mi troviĝis inter protestantoj kaj strikantaj studentoj. Indas aldoni, ke, sen la ĝenerala striko de la pola popolo en 1981 kaj la sekvaj okazintaĵoj, ne falus la berlina muro. Ĉar la muroj falas ne pro flagoj, sed pro agoj.



Pro kio emociiĝas esperantistoj

En la lastaj monatoj okazis agoj, pro kiuj esperantistoj emociiĝis kaj pri kiuj daŭre redissendis informojn tra la reto.

Temis pri la jenaj tri agoj (kun ege mallongigita enhavo de la paroladoj):

1 La 17-an de oktobro 2017, laŭ invito de la direktoro de la Dokumentada Fakto de UN, la reprezentanto de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj, Humphrey Tonkin, prelegis ĉe la Tradukaj Servoj de UN pri "La Graveco de Lingvoj en la Tagordo de UN". Lia prelego emfazis, ke la oficistoj de UN, ekster la lingvaj servoj, emas subtaksi la gravecon de lingvoj ne nur ene de la strukturoj de UN sed ankaŭ en la programo de internacia evoluiĝo. Humphrey Tonkin estis invitita kiel fakulo pri lingvaj demandoj – rekono samtempe de la rolo de UEA en la stimulado de serioza kaj realisma debato pri la lingva politiko de UN, kaj de la pretendoj specife de Esperanto, sed kun nur flankaj pritraktoj. Ĉi-lasto tamen okazis precipe en la postprelega diskutado inter la trideko da partoprenantoj.

2 Rakoen Maertens parolis nome de UEA en la Ĝenerala Konferenco de UNESKO la 6-an de novembro 2017. Li eĉ pli rekte parolis pri Esperanto. Li diris interalie: "Uzado de specifa lingvo ligita al specifa kulturo kreas komunikacion antaŭjuĝon".

Universala Esperanto-Asocio klopodas reagi al tiuj problemoj. Kune kun pli ol 100 landaj Esperanto-asocioj kaj pli ol 60 alligitaj fakaj asocioj, nia asocio pledas por profunda multfaceta komunikado, egaleco inter lingvoj kaj kulturoj, lingva diverseco kaj kulturaj interŝanĝoj.

La deirpunkto de la internacia lingvo Esperanto estas la bezono de pli bona komunikado per komuna

egaleca lingvo, facile lernebla kaj sen ligo al ajna politika potenco.

Kun ĝojo ni ankaŭ anoncas, ke ekde tiu ĉi jaro la ĵus relanĉita *Unesko-Kuriero* havas Esperantan version.

3 Kvar membroj (Nicole Margot, Stefano Keller, Cesco Reale kaj Adrian Tanner) de la ĝeneva teamo de UEA-reprezentantoj ĉe UN partoprenis la 10-an sesion de la Forumo pri Minoritatoj en la Palaco de Nacioj, la 30-an de novembro kaj la 1-an de decembro 2017. Aperis nun parto de la tuta filmo pri la posttagmezo de tiu tago ĉe UN, kiu estis spektebla ankaŭ per rekta elsendo de UN dum la interveno, kun la alparolo de Stefano Keller, okazinta la 30-an de novembro. Esence li diris en la franca: "Mi nomiĝas Stefano Keller, kun miaj kolegoj ĉi tie ĉeestaj mi reprezentas Universalan Esperanto-Asociacion (UEA), la mondan organizaĵon de la parolantoj de Esperanto, la lingvo internacia. Male al aliaj lingvoj, Esperanto ne povas havi imperiistajn tendencojn kaj havas nenian ligan kun intereso ekonomiaj aŭ politikaj. Ĝi estas la lingvo de tiu, kiu ĝin elektas, kaj ĝi kreas lingvan egalecon en la komunikado inter la popoloj. Universala Esperanto-Asocio defendas la lingvajn rajtojn de ĉiuj minoritatoj kaj de ĉiuj indiĝenaj popoloj, dum jam pli ol jarcento.

Do, kial esperantistoj tiom emociiĝis? Se oni konas la animon de veraj kaj simplaj esperantistoj, oni scias kial. Preter ĉiuj paroloj pri raŭmismo kaj finvenkismo esperantistoj ĝojas, kiam oni disvastigas Esperanton, kaj en ĉi tiuj tri okazoj la eventoj estis elstaraj mondaj okazaĵoj. Nun, post la ĝojo, ni subtenu UEA-n, ĉar ĝi subtenas Esperanton: <http://uea.org/> alighoj/kotiztabelo.

SERIO - MEMORINDAJ ESPERANTISTOJ 4

Přemysl Pitter, la protektanto de ĉiu bezonanta infano

Xavi Alcalde

En danĝeraj momentoj malfacilas helpi aliulojn. Verŝajne plej malfacilas tion fari kiam la persekutantoj estas oniaj samnacionoj. Ĝuste tiel agadis memorinda ĉeĥo: Přemysl Pitter (1895-1976).

Li naskiĝis en Prago, kiel sepa frato de malbonŝanca familio, kiu perdis ĉiujn ses infanojn ankoraŭ junaj. Plenumante la deziron de la patro, li fariĝis tipografo kaj post lia morto respondecis pri la familia preseo. Ankaŭ la patrino mortis kiam Pitter estis juna. En 1914 adoleskanto Přemysl libervole aliĝis al la aŭstra armeo kaj en la milito spertis multajn aventurojn. Interalie, li estis vundita. Dufoje li klopodis dizerti kaj en unu okazo estis kondamnita al mortpuno. Iom mirakle, en la tiama ĥaoso tiu verdikto neniam efektiviĝis. Tiam li legis Tolstoj-on kaj alian kontraŭmilitan literaturon, iĝante fervora pacisto. Poste, li ankoraŭ devis soldatservi en la ĉeĥoslovaka armeo.

En la 1920-aj jaroj li aktivis pedagogie kun la junularo de la malriĉa kvartalo Žižkov, multaj el kies patroj soldatservis aŭ estis en kaptiteco. Samtempe, li enskribiĝis en evangelia fakultato. Ne fininte siajn studojn, li decidis realigi siajn humanismajn idealojn. Li fondis la spiritan kaj etikan movadon Nova Jerusalemo kaj la gazeton Sbratření (Kunfrateco), kun bunta enhavo: fumado, vegetarismo, pacismo, neperforto, homaj rajtoj, Esperanto, alkoholismo, kontraŭsemitismo, kon-



... li kunproponis ke oni enkonduku Esperanton kiel kroman laborlingvon en pacismajn konferencojn

traŭfaŝismo ktp. Elstara oratoro, li fariĝis publika figuro.

Kune kun la verkistino Pavla Moudrá, Pitter kreis la ĉeĥoslovakian filion de Internacia Movado por Repaciĝo. Tie li konatiĝis kun la svisino Olga Fierz, sia plej intima kunlaborantino. Tie li ankaŭ fondis Kristana-n Komunismo-n, organizaĵon kiu serĉis siajn radikojn en la komunuma spirito de la unuaj kristanoj. Li ankaŭ aktivis en Internacio de Militrifuzantoj kaj korespondis kun famaj pacistoj, kiel Gandhi, Einstein, Rolland, Cérésolle, Schweitzer, Rádl ktp. En tiu kadro, li kunproponis ke oni enkonduku Esperanton kiel kroman laborlingvon en pacismajn konferencojn. La proponon oni akceptis, sed pro la konkurenco de aliaj lingvoj (angla, germana, franca, sed ankaŭ Ido kaj Occidental) la eksperimento fiaskis. Laŭ Pitter, en tiu historia momento la zamenhofa iniciato restis neefektivebla.

En la 1930-aj jaroj li gvidis la stariĝon de la porjunulara eduka

rifuĝejo Milič. Tamen liaj ĉefaj humanaj atingoj okazis dum la nazia okupado. Spite al enorma risko por siaj vivoj, Pitter kaj liaj kunlaborantoj (interalie, Ferdinand Krch, kiu ankaŭ simpatiis al Esperanto "kiel forta pacifisma armilo") lanĉis programon por helpi al judoj kaj al germanaj demokratoj en danĝero. En 1945 tiu agado fariĝis Operacio Kastejoj. Ĝis kvin palacojn kaj kastejojn ili luis por protekti centojn da judaj infanoj kontraŭ la nazia persekutado! Eĉ pli impresive, post la fino de la milito la samajn kastejojn ili uzis por defendi germanajn junulojn kontraŭ la reprezalio de la ĉeĥoslovaka loĝantaro. Pro tiuj kuraĝaj travivaĵoj Pitter kaj Fierz estas agnoskitaj kiel Justuloj inter la Nacioj.

Baldaŭ, ambaŭ devis fuĝi al okcidenta Eŭropo, ĉi-foje de la komunisma reĝimo. Dum jardeko ili daŭrigis sian solidaran agadon en la rifuĝejo Valka apud Nurembergo, ankaŭ kunlaborante kun BBC (Brita Brodkasta Korporacio) kaj Radio Libera Eŭropo. Post 1968 ili subtenis la fuĝintojn el Ĉeĥoslovakio. Fine, dum siaj lastaj jaroj ili koncentriĝis sur la kampo de eldonado.

Kiam Přemysl Pitter estis infano, lia patrino kunportis lin al sia Esperanta kurso. Tie li deklamis la zamenhofan poemon Al la fratinoj. Poste li opiniis, ke la mondo ankoraŭ ne maturas por lingva revolucio. Tamen, ĉu li ne montris praktike ke ja eblas efektiviĝi la internan ideon de Esperanto? Ĉu en la kastejo estis ĉeĥoj, judoj kaj germanoj aŭ ĉu simple homoj kun homoj?

ARTIKOLO

La TEJO-prezidanto rezignas la oficon

En la lastaj tagoj de decembro, dum la kunsido kadre de Junulara Esperanto-Semajno ĉe Szczecin (Pollando), la Komitato ricevis la proponon ke Enric Baltasar translokiĝu en Roterdamon por estri la volontulojn ĉe la TEJO-sidejo kaj do ke la asocio mone kompensu liajn ĉiutagajn vivelspezojn, ĉar la prezidanto ne havas sufiĉajn monrimedojn por subteni sian restadon. Tiu propono havis la subtenon ankaŭ de Michael Boris Mandirola kaj Francesco Maurrelli, kiu estas la dua vicprezidanto, sed la Komitato rifuzis la peton per io kontraŭaj voĉoj kaj 9 favoraj.

Tamen la espero pri ia eltrovo ne malaperis inter la proponantoj. Fakte Francesco Maurrelli esprimis en la Telegram-kanalo de TEJO ankoraŭ optimisman konvinkon pri taŭga pritrakto de la afero: "Nun ni devas cerbumi pri alia solvo; mi esperas ke venos proponoj de ĉiuj, kaj aparte de tiuj kiuj voĉdonis kontraŭ la solvo proponita (pozicio kiun mi respektas, sed kiu en si

mem ne alportas solvon, se ne estas ankaŭ konstrua fazo)".

Domaĝe la mona situacio de TEJO mem ne estas prospera kaj do neniel ebligas subtenon por loĝado. En la sama okazo, oni fakte pritraktis ankaŭ la ekonomiajn aspektojn.

La unua versio de la financa raporto pri la jaro 2016, kiu laŭ la regularo devus esti prezentita antaŭ januaro 2017, estis sendita al la komitata listo antaŭ kelkaj tagoj, sed ĝi estis manka. TEJO klarigis tion en la dokumento: "En la raporto mankas membrokotizo de TEJO kaj spezo de Pasporta Servo. Ni ankoraŭ ne ricevis informon de UEA ĝis nun. Krome ĝi ne inkluzivas informojn rilatajn al Internacia Junulara Kongreso 2016 (IJK 2016 havas ne aprobitan propran raporton), Afrika Eŭropa Junulara Kapablo, al la projektoj *Effective Communication for Youth* (Efika Junulara Komunikado) kaj *Empower Trainers, Empower Youth* (Povigu Trejnantojn, Povigu Gejunu-

lojn). Informo pri la projektoj estos en la raporto de la jaro, kiam alvenos fina pritakso de la subvenciona instanco. ETEY-projekto finiĝis en 2016, sed la pritakso alvenis en 2017, kaj ĝia fina rezulto – pozitiva saldo je 14.067,05 eŭroj – estos en la spezkonto de 2017".

Kvankam, laŭ la raporto, la problemoj fontis ne el TEJO sed el Centra Oficejo de UEA, la priserĉitaj informoj jam aperis publike en la junia numero de la asocia revuo *Esperanto* kaj la membrokotizoj ricevitaj de TEJO estis sume 1.773,89 eŭroj.

Do, laŭ la provizora financa raporto, TEJO dum la jaro 2016 havis 4.203,98 eŭrojn da profito, sed en la sekva tago la "profito" deficitis... per 41.255,70 eŭroj.

Tiu ĉi estas malbona tempo por la pintaj internaciaj asocioj UEA kaj TEJO, ambaŭ deficitaj, verŝajne, ĉar ili estas premitaj inter la ekonomia krizo kaj la neceso agi por Esperanto kaj propagandi ĝin. La monaj malfaciloj de unu, ĉiuokaze, ne influas la

alian, ĉar nun ili estas jure sendependaj asocioj.

Fine, la 31-an de decembro 2017, pro tio ke sen tiu monsubteno la persona situacio de la prezidanto Enric Baltasar ne ebligas ke li plenumu la taskojn proprajn al la ofico kaj TEJO ne povas aŭ ne volas subteni lin, li demisiis, post aprobo de la nova Strategio 2018-2020 kaj la buĝeto. Li oficialigis sian decidon per la lego de leteroj al Komitato; ĝia titolo estis kaj forta mesaĝo kaj bondeziro por la estonto de la junularo: "Pensu pri la jeno dum mi legas ĝin: TEJO devas esti platformo por la junulara Esperanto-movado".

Jen la signifoplena enhavo de la leteroj de la dimisiinta prezidanto: "Estimataj aktivuloj,

Preter homoj ni estas konstruantoj, kaj estas inspirige por mi esti kun homoj kiuj tiom sin dediĉas al nia komuna mondotransformiga celo. Estas pro tio ke mi sentas la bezonon danki ĉiujn kiuj plenis per revoj la mondon, ĉiu-

jn kun kiuj mi kunbatalis kaj ĉiujn kiuj kredis je mi.

Por Esperanto mi decidis agadi antaŭ ol eklerni kaj al la demando kiun mi aŭdis mil fojojn, "Kiel vi sola ŝanĝos la mondon?", nun mi povus senhezite respondi ke mia laboro atingis centojn da miloj da homoj. Ni ne estas solaj; ni komencas per niaj revoj, kaj ili flamigas la mondon. Ni kapablas ĉion.

Mi kandidatiĝis kiel gvidanto de nia monda organizo ĉar en mia koro fluas deziro je ŝanĝoj, realigemo de ideoj, rekonstruo por alia ebla, por alia enda, estonteco. Tamen, hodiaŭ mi devas fari parentezon kaj entrepreni doloran decidon demisiante kiel prezidanto ĉar, pro personaj kialoj, mi ne povas doni la maksimumon de mi. Ĉi tiu demisio ekvalidos je la fino de la okazanta evento, la 2-an de januaro de 2018.

Mia pasio nur povas kreski. La fokuso pri ŝanĝoj kaj rezultoj restas.

Ni revidos nin en la sekva batalo.

INSTITUTO PENSORGANIZO PRI MONDA E-JURNALISMO TEO JUNG



HEROLDO DE ESPERANTO
INTERNACIA NOVAĴAGENTEJO
HDE EN PLURAJ LINGVOJ
RILATOJ KUN ĴURNALISMAJ INSTITUCIOJ
ĴURNALISMAJ EVENTOJ
ELDONADO DE FAKAJ PERIODAĴOJ

Instituto Teo Jung: esenco kaj estonteco de *Heroldo*

Antonio Codazzi

Instituto Teo Jung naskiĝos dum la 103-a UK en Lisbono, kiam individuaj abonantoj de *Heroldo de Esperanto* iĝos anoj de ĝia fond-komisiono, kiu poste kreas kaj aprobas la provizoran statuton por la fina ratifo dum estonta ĝenerala asembleo. Pro tio, ke la sidejo de la instituto estos en Brazilo, la plejparto de la statuto devos konformi al la brazilaj leĝoj. La elekto de la UK por la unua asembleo devenas evidente de la ebleco atingi multajn abonantojn el la tuta mondo en la sama loko, tamen ankaŭ la evento mem tre konvenas al la kongresa temo: *Kulturoj, lingvoj, tutmondiĝo: Kien nun?*

Fakte la kreo de tiu asocio estas parto de nova strategio por ke la E-movado povu paŝoteni kun mondo ĉiam pli evoluiĝanta.

Kompreneble la renkontiĝo ĉe la UK estas nur la deirpunkto; la fond-komisiono, kiu estos formita tie, poste devos decidi pri la definitivaj celoj kaj ceteraj statutaj punktoj, kiujn la abonantaro de *Heroldo* aprobas per estonta ĝenerala asembleo.

Tio estas la plano. Tamen, kio estas Instituto Teo Jung? Kiuj estas ĝiaj intencoj kaj kial ĝi estas necesa? Sed, ĉefe, ĉu io povos malhelpi ĝian naskiĝon?

Instituto Teo Jung estos neregistara organizo, do sen profitaj celoj, kiu funkcios kiel pensorganizo kaj kies membraro konsistos el individuaj abonantoj de *Heroldo*. La ĉefaj taskoj estos eldoni kaj subteni la gazeton *Heroldo de Esperanto* – tial ke ĝia sendependeco ne fariĝu afero de nur unu posedanto aŭ iu entrepreno – sed ankaŭ roli kiel novaĵagentejo por regule dissendi al la neesperantista gazetaro novaĵojn kaj artikolojn pri nia lingvo, la E-movado, la kulturo de Esperanto kaj aliaj temoj (lingva diskriminacio, lingvaj rajtoj, poliglota movado ktp).

ITJ ESTOS PLI OL ELDONEJO DE HEROLDO

Laŭ la deirplano, tiu novaĵagentejo funkcios unue en la portugala lingvo, poste en la angla, hispana, rusa, germana, franca, itala, japana, ĉina kaj multaj aliaj lingvoj. Bonŝance Esperanto estas pontolingvo kiu tre simpligas tiun taskon, ĉefe danke al la ĉeesto de forta kaj vigla tutmonda komunumo. Do Instituto Teo Jung ne rolas nur kiel “speco de kooperativo” por subte-



La celo de la nuna eldonisto de la gazeto fondita de Teo Jung estas donaci ĝin en tute bona ordo

ni la eldonon de *Heroldo de Esperanto*, sed celas iĝi vera profesia novaĵagentejo.

Krome Instituto Teo Jung, se la mona situacio ebligas tion, celos ankaŭ eldoni aliajn periodaĵojn en Esperanto, ĉefe pri fakaj temoj. Ĝi celas interalie esti aktiva – ankaŭ kiel sponsoro – pri la organizo de specifaj iniciatoj kaj eventoj por diskonigi kaj Esperanton kaj *Heroldo*-n en la ĵurnalisma medio (fakultatoj pri ĵurnalismo, asocioj kaj sindikatoj de ĵurnalistoj, eldonejoj de periodaĵoj ktp).

Do, kvankam la unua punkto de ĝia priskribo asertas ke la instituto estas ligita al *Heroldo*, tio ne estas la nura celo, ĉar la asocio povos ekzisti ankaŭ sen ĉi tiu tasko, kiu, eble, povus esti neakceptebla aŭ neakceptita de la abonantaro de *Heroldo*. Fabrício Valle deklaris, tamen, ke “*Heroldo* esence rolos en la laborprogramo de Instituto Teo Jung, kies celaro estos ligita al ĵurnalismo, kaj ĉion mi faros por konvinki la abonantaron de *Heroldo*, ke la konkretigo de la ideo estos granda iniciato, kiu povos tre utili en la profesia diskonigado de Esperanto al grandaj periodaĵoj, radi- kaj televidstacioj”. Iom radikale li asertis, ke “sen *Heroldo* ne estos Instituto Teo Jung”.

LA KONDIĈOJ POR DONI HEROLDO-N AL ĜIA ABONANTARO

Heroldo nun estas proprieto de Fabrício Valle, kiu donos rajtojn pri la gazeto al ITJ nur post la fina elpago de ĝia ŝuldo al LF-koop, la antaŭa posedanto. Tamen inter la nuna kaj la antaŭa proprietoj naskiĝis disputo pri la plenumo de la kontrakta interkonsento. Do Fabrício Valle petis de LF-koop refaron de la kontrakto, kiu ebligis solvon de la konflikto pri la posedo de *Heroldo* kaj sekve la elpagon de la ŝuldo al la svisa kooperativo ligita al la Esperanta Civito. La kerno de la konflikto estas la listo pri la aktualaj abonantoj, neniam live-

rita de LF-koop al la nova posedanto, kiu nun pretas rezigni pri tio.

Krome Fabrício Valle donacos la gazeton nur se ĝi unue fariĝos daŭripova gazeto, kun sufiĉe alta nombro da abonantoj, tiel ke eblos eldoni jare 12 numerojn de la papera versio kaj dungu profesion skipton (almenaŭ unu ĉefredaktoron, unu redakcian sekretarion, unu ĉefprovleganton kaj unu administran oficiston); laŭ la postuloj de la donaconto (kiu sekvas la liniojn de sociala E-movado, kies ĉefmotoro estos la NRO Sociala Lingvo) la gazeto devos ankaŭ finance kompensi ĉiujn kontribuantojn.

Se la nuna proprieto de *Heroldo* ne estos ankoraŭ kvitiĝinta okaze de la formala fondo de ITJ (verŝajne ĉar la disputo inter li kaj LF-koop ne estos solvita kaj do la pagoj restos ankoraŭ suspenditaj), ĉiunmonate ekde januaro 2018 pagpartoj estos deponataj por LF-koop en banka konto en Brazilo, kun la celo kvitigi la brazilan eldoniston de *Heroldo* kontraŭ LF-koop. Ĉiuokaze, post la plenumo de la ceteraj kondiĉoj, la abonantaro de *Heroldo* devos decidi ĉu heredi aŭ ne la disputon kun la svisa kooperativo, eks-propieto de *Heroldo*, ĉar tio difinos ĉu ITJ estos formale fondita aŭ ne. La celo de la nuna eldonisto de la gazeto fondita de Teo Jung estas donaci ĝin en tute bona ordo: daŭripova, kun formita profesia skipo kaj sen konflikto kun LF-koop. Do, estas en la manoj de la gvidantoj de LF-koop, ligitaj al la Esperanta Civito, ĉu la tuta afero venos al feliĉa fino aŭ ĉu ili prenos la decidon daŭrigi la konflikton kreitan esence pro rompo de la kontrakto, unue flanke de LF-koop pro la sendo de falsa listo de aktualaj abonantoj, kun eksabonantoj – eĉ mortintaj – kun nur poŝtaj adresoj; absolute neniu retadreso. Fabrício Valle konsentas, ke pro tio nur unu pagparto estis pagita, sed nun pretas rezigni pri la listo kun aktualaj abonantoj kaj repreni la pagon surbaze de nova kontrakto.

La lasta postulo akceptenda, por ke la donaco efektiviĝu, rilatas al la indikoj kaj al la ideoj entenataj en la *Letero pri la rolo kaj estonteco de Instituto Teo Jung*, verkota de Fabrício Valle, kiu estas ne nur la proprieto de *Heroldo* sed ankaŭ la ĉefa elpensinto de ITJ mem. Kompreneble tio ne estos ultimato; fakte eblos diskuti la enhavon de la dokumento kun la donanto kaj modifi ĝin. Tiu letero funkcios, laŭ la vortoj de la aŭtoro, kiel “la Fundamento de ITJ kaj *Heroldo*. Ĝi estos tute netuŝebla kiel la *Fundamento de Esperanto* kaj donos direktivojn, por ke *Heroldo de Esperanto* restu por ĉiam sendependa gazeto kaj ne fariĝu gazeto regata de nur unu aŭ malmultaj homoj”. Resume: la *Letero pri la rolo kaj estonteco de Instituto Teo Jung* difinos kio estos kaj kiel funkcios ITJ kaj, sekve, ankaŭ *Heroldo*.

Se la kunsido en Lisbono sukcesos, Fabrício Valle testamentos favore de Instituto Teo Jung por garantii ke, okaze de lia eventuala morto, la gazeto ne fariĝu orfo kaj do por pludaŭrigi la subtenon al la iniciato, eĉ sen la plenumo de ĉiuj kondiĉoj. Sendepende de la tempo necesa por la atingo de ĉiuj kondiĉoj por la konkretigo de la donaco, la abonantoj estos enplektataj ekde tiu kunsido, kiun oni planas okazigi en la UK de Lisbono. La abonantoj devas aktive ekpartopreni en la vivo de *Heroldo*, por sin prepari ĝin ricevi donace sisteme.

Laŭ la planoj de la iniciato, Instituto Teo Jung certigos al *Heroldo de Esperanto* longan vivon kaj multe kontribuos al ĝia evoluo kiel sendependa gazeto kaj profesinivela gazetara servo, en pluraj naciaj lingvoj. Kaj ni ne parolis pri la iniciato eldoni nacilingvajn versiojn de *Heroldo*. La unua numero en la portugala lingvo jam aperis kaj estas legebla ĉe <http://bit.ly/Heroldo-Brasil-1>. La pluraj nacilingvaj versioj de *Heroldo* certe aperigos la materialon de la novaĵagentejo de ITJ.

Neniu neos, ke tiu solvo estas bona por ĉiuj, ĉar *Heroldo de Esperanto*, kiel posedajo de la abonantoj, unuigintaj en organizaĵo sen profitaj celoj kun kelkaj aliaj celoj krom la subteno de HdE-eldonado sed iel ligitaj al ĵurnalismo, honoros la fondinton de *Heroldo de Esperanto*, nome Teo Jung, kaj tio estos granda paŝo por grandioza jubileo en 2020 (100-jariĝo de *Heroldo*).

TRA ESPERANTUJO

KONKURSOJ TRA ESPERANTUJO

INTERNACIA KONKURSO: POEZIO POR JUNULOJ

La konkurso estas organizata de la Asocio *Poesie en liberté* (Poezio tut-libera) ekde 1998. En 2017 partoprenis pli ol 4000 junuloj el pli ol 20 landoj. Ĝis nun estis akceptitaj nur franclingvaj poemoj.

Danke al la iniciato de Esperanto-France en la jaro 2018, por la 20-a okazigo, eblas alsendi poemojn ankaŭ en Esperanto; vidu detalojn ĉe <https://www.poesie-en-liberte.fr/prix-esperanto/>

Partopreni povas ĉiuj gejunuloj aĝantaj 15-25 jarojn, el iu ajn lando. La partopreno konsistas en sendo de neeldonita poemo, versa aŭ proza, kun maksimume 30 versoj aŭ 30 linioj. La kandidatoj rajtas sendi po unu poemon en la franca aŭ en Esperanto, sed eblas sendi nur po unu en ĉiu el tiuj lingvoj. La partopreno okazas nur rete ĝis la 7-a de aprilo 2018, uzante la formularon ĉe <https://www.formulaire-poesie.fr/index.php/prix-esperanto>

Fine de majo la ĵurio elektos la gajnantojn, kiuj ricevos kiel premion 3-tagan viziton al Parizo. La esperantistoj loĝos ĉe esperantistaj familioj kaj partoprenos grandan finan ceremonion. Samtempe, la poemoj estos eldonitaj libroforme. Ne hezitu do sendi vian poemon. Eĉ se vi ne gajnas premion, via partopreno estas grava. Ni respondos al ĉiuj.

Kontaktoj aŭ demandoj: Gilles Tabard, gilles.tabard@gmail.com, komitatano de Esperanto-France kaj vic-prezidanto de *Poesie en liberté* (Poezio tut-libera). – Gilles Tabard/Ret-Info

ITALA E-FEDERACIO: TRADUKKONKURSO DE LA ITALA AL ESPERANTO

La konkurso konsistas el du branĉoj:

poezio: maksimuma longo ne fiksitaj
prozo (rakonto, novelo): maksimuma longo 13.000
karaktroj.

La komisiono povos asigni ĝis tri premiojn por ĉiu branĉo. La rezultoj estos anoncitaj en kadre de la itala kongreso de Esperanto, en San Marino.

Ĉiu persono rajtas konkursi por ĉiu branĉo per maksimume tri verkoj, kies tradukoj devas esti neniam antaŭe eldonitaj per ajna komunikilo (prese, rete, lege, blogo ktp).

La gajnintoj de la unua premio ne rajtas partopreni en la konkurso en la sama branĉo dum la sekvaj tri jaroj.

La konkursaĵojn, kune kun la originaloj, oni sendu al la sekretario, Ivan Orsini, prefere per retmesaĝo al la adreso concorso@esperanto.it, indikante la branĉon, la elektitan pseŭdonimon kaj la efektivajn nomojn kaj adresojn. Se tio ne eblas, oni sendu ilin papere al la adreso

Federazione Esperantista Italiana, via Villoresi 38, I-20143 Milano, Italia,

indikante sur la koverto "literatura konkurso" kaj enmetante la kontribuado(j)n kaj la originala(j)n tradukita(j)n verko(j)n sen ajna indiko kaj notante en aparta folio ĉiujn necesajn indikojn kiel supre.

Premioj: la gajnintoj de la unua premio de la du branĉoj ricevos akvaforton originale faritan por la premio Zamenhof, por la aliaj la premio konsistos el esperantlingvaj libroj.

Limdato por la sendado estas la 30-a de aprilo 2018.

Juĝkomisiono: prezidanto Carlo Minnaja, sekretario: Ivan Orsini, por branĉo prozo: Gabriele Aquilina, Cristina de' Giorgi, Nicola Minnaja; por branĉo poezio: Giulio Cappa, Mauro Nervi, Nicola Ruggiero.

La sekretario informos ĝis la 1-a de aŭgusto la gajnintojn pri la premio.

La partoprenantoj cedas senpage al IEF por la unua jaro la rajton je unua publikigo.

MUZIKA KONKURSO: ORA INSULO

Kipra Esperanto-Unio plezure anoncas la unuafan organizon de la muzika konkurso "Ora Insulo". Temas pri konkurso pri porinfanaj kantoj. Ili povas esti en Esperanto aŭ en iu ajn nacia lingvo (aŭ parte en Esperanto kaj parte en nacilingvo), laŭ la intencoj kaj la kreemo de la diversaj aŭtoroj.

Okaze de nacilingva kanto, ja nepras tamen aldoni esperantlingvan "resumon", kiu klarigu al la publiko la temon kaj la celojn de la kanto (kvazaŭ temus pri faka/akademia artikolo), tiel ke ĝi povos esti komprenata ankaŭ de esperantistoj, kiuj ne parolas la lingvon de la kanto, kaj eventuale tradukita de la organizantoj al diversaj nacilingvoj.

Estus bone, se la kantoj estus aranĝitaj kaj kiel eble plej profesinivelaj. Laŭprefere ili estu kantitaj de unu aŭ pluraj infanoj. Tamen, se tio ne eblas, oni rajtas proponi ankaŭ pli amatorecajn kantojn, kun la akompanado de almenaŭ unu muzikinstrumento (piano, gitaro

ktp) kaj eventuale plenkreskula voĉo. La celo estas kolekti ĉiujare porinfanajn kantojn el multaj landoj kaj kontinentoj de la mondo.

La limdato por la sendo de la konkursaĵoj (maksimume 2 fare de la sama aŭtoro), kiu estas senpage, estas la 31-a de marto 2018. Estos premioj pri plej bonaj tekstoj, muzikoj, samkiel pri la plej inda socia mesaĝo ktp. La premioj estos por la aŭtoroj kaj NE por la infanoj, kiuj ja ne konkuras unu kontraŭ la alia. La akceptitaj kantoj aperos en disko, kiu estos eldonita kaj tutmonde disdonita en interreto (iTunes, Spotify, Google Play, Amazon, Deezer ktp) zorge de la organizantoj sen elspezoj por la aŭtoroj. Ĉiuj aŭtoroj de la akceptitaj kantoj ricevos poŝte partopren-diplomon.

Se vin interesas ricevi la kompletan regularon kaj pli da detaloj pri la okazaĵo (formato de la kantoj kaj de la tekstoj, daŭro, son-kvalito ktp), bonvole sendu retmesaĝon al orainsulo@gmail.com. –

Roberto Pigo

UEA: BELARTAJ KONKURSOJ EN 2018

La Sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA, unu el la plej gravaj kaj jam klasikaj manifestiĝoj de la E-kulturo, invitas verkemulojn al partopreno en ilia 68-a okazigo. La rezultojn oni anoncos kadre de la 103-a Universala Kongreso en Lisbono. Kiel kutime, partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al aliĝo al la UK. La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, krom en la branĉo *Infanlibro de la Jaro*. Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo aŭ subbranĉo. Endas sekvi jenajn regulojn:

Poezio: maksimuma longo ne fiksitaj.

Prozo: maksimuma longo 200 x 65 karaktroj (kvino da paĝoj).

Prozo, subbranĉo mikronoveloj: maksimuma longo 100 vortoj. Aljuĝita estas nur unu premio, kiu nomiĝas Premio Paula Adúriz.

Teatraĵoj: maksimuma longo ne fiksitaj.

Teatraĵoj, subbranĉo monologoj (unupersonaj teatraĵoj) kaj skeĉoj (unu- aŭ divers-personaj): daŭro inter 10 kaj 15 minutoj. Aljuĝita estas nur unu premio, kiu nomiĝas Premio María Cuevas.

Eseo: teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo, proksimuma longo 400 x 65 karaktroj (deko da paĝoj). La unua premio nomiĝas Premio Luigi Minnaja.

Infanlibro de la Jaro: originala aŭ tradukita libro por infanoj presforme aperinta en 2017. Aljuĝita estas nur unu premio.

La absoluta limdato por ricevo de konkursaĵoj estas la 31-a de marto 2018. Oni sendu po unu ekzempleron de ĉiu konkursaĵo – krom en la branĉo *Infanlibro* – al Belartaj Konkursoj de UEA, ĉe Miguel Gutiérrez Adúriz, prefere retroŝte al la adreso sciosfero@gmail.com; aŭ, se tio ne eblas, papere al la adreso: los

Coterros 1-C, 2 Izda, 390600 Muriedas; Cantabria; Hispanio, indikante la elektitan pseŭdonimon por gardi la anonimecon de la aŭtoro. Por la branĉo *Infanlibro* oni sendu unu ekzempleron de la koncerna libro al la adreso de Miguel Gutiérrez Adúriz kaj tri ekzemplerojn al Ionel Oneț, Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Premioj: en la branĉoj Poezio, Prozo, Teatraĵoj kaj Eseo: unua premio 260 €, dua premio 182 €, tria premio 104 €; Nova Talento 182 €. En la branĉo *Infanlibro de la Jaro* 546 €. En la du subbranĉoj Mikronoveloj kaj Monologoj kaj skeĉoj po 125 €.

Noto: Kiel konstateblas, ĉi-jare eksplike konkretiĝas la ideo diversmedie manifestita de la Prezidanto kaj la Sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA, ke ili volas potencigi tri ĝenrojn: mikronovelon aŭ mallongan rakonton, ene de la branĉo Prozo, kaj skeĉon kaj monologon (unupersonan, ordinare mallongan, teatraĵon), ene de la branĉo Teatraĵoj. Unue, por ke la E-beleto ne fremdu al la furoro spertata de tiuj ĝenroj kadre de etnaj literaturoj. Due, ĉar ĉi-ĝenraj kreaĵoj konsistigas materialon plej interesan kaj oportunan por ludado kuntekste de niaj kongresoj kaj renkontiĝoj. Trie, por malfermi la BK-pordojn al kiel eble plej diversa konkursantaro. Atentu, tamen, ke la ĉi-jaran enkondukon de ambaŭ subbranĉoj ni faras nur prove. Ilia definitiva aliĝo al la BK-fakoj dependos de la reago far la BK-partoprenantoj.

Detala regularo troviĝas ĉe http://uea.org/teko/regularoj/belartaj_konkursoj. La verkoj de la Belartaj Konkursoj, premiitaj en 2017, legeblas en la volumo *Belarta rikolto 2017*, eldonota de *Mondial*. La premiistoj ekde la komenco de la Belartaj Konkursoj en 1950 troviĝas ĉi tie: <http://esperanto.net/literaturo/bk/index.html>.

Loka agado ★ Fakaj iniciatoj ★ E-protagonistoj ★ Novigaj iniciatoj ★ Eventoj ★ Plukitaj frazoj



MICHAEL B. MANDIROLA: ĈU TRAFE?

“UEA havas mezuman aĝon kiu superas 60. Lingvokomunumo kun tia aĝdistribuo estus konsiderata minacata; kompreneble Esperanto estas aparta okazo. Oni plejofte ĝin ne lernas denaske sed memvole pro ĝiaj idealoj, rapidlerneblo aŭ unika komunumo. Sed evidente la fakto ke plejparto de la ĉefaktivuloj estas homoj kiuj maturiĝis en alia jarcento ne helpas modernan komunikadon kaj aliron kiu ebligis pli vaste kaj efike atingi junan publikon.” – Dirita al la HdE-redakcio” okaze de la finpretigo de ĉi-numero

KAEST: SCIENCO KAJ TEKNIKO

“Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST) estas serio de seminarioj kaj konferencoj ekzercantaj scienc-teknikan aplikon de Esperanto okazantaj sur la teritorio de hodiaŭaj Ĉeĥio kaj Slovakio. Inter 1978 kaj 1989 organizis ilin la scienc-teknika sekcio de ĉeĥoslovakaj esperantistoj, tiam sub la mallongigoj AEST aŭ SAEST (Seminario pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko). Post paŭzo ekde 1998 daŭrigis la organizadon Ĉeĥa Esperanto-Asocio kunlabore kun la agentejo KAVA-PECH. Ekde 2010 transprenis la organizadon E@I.” (Vikipedio). En 2018 ĝi okazos en Modra-Harmónia (Slovakio), de la 18-a al la 21-a de oktobro. Temo: Evoluo de Paradignomo en Scienco kaj Tekniko.

ESPERANTO: ESPERANTISTA EKONOMIO

Ĉu vi konscias, ke ekzistas la tiel nomata esperantista ekonomio? Laŭ la statuto de Intraespo - Monda Organizo por la Disvolvado de la Esperantista Ekonomio, “oni difinas esperantistan ekonomion kiel la aron de ĉiuj ekonomiaj aktivaĵoj en kiuj la internacia lingvo Esperanto, ĉu rekte, ĉu nerekte, rolas kiel laborlingvo.” Se vi konsentas aŭ ne, partoprenu la enketon pri tio ĉe <http://bit.ly/enketo-esperantistaekonomio>



FEDERICO GOBBO: KIO PRI KATALUNIO?

Federico Gobbo afiŝis en Facebook: “Kion vi opinias pri la nuna situacio en Katalunio? Mi ne plu scias kion pensi”. Nu, kara Federico, bonvolu legi en la 4-a numero de *Heroldo* la artikolon de A. Fabián Jiménez (*Naciismo, esperantismo kaj kio okazis en Katalunio*) kaj ĉi-numere la artikolon de Rubén Fernández Asensio (*Naciismo, esperantismo kaj la postaĵo de naciistoj*). En la 6-a numero de la jarkolekto 2017 alia artikolo aperos.

LODE: TREZORO HUANG YINBAO

“La Ondo de Esperanto en 1998 iniciatis ĉiujaran proklamadon de la Esperantisto de la Jaro. Al ĉi tiu projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj. Kiel unua laŭreato en 1998 estis elektita William Auld. En 1999 lin sekvis Keppel Enderby. En 2000 estis distingitaj tri personoj: Hans Bakker, Mauro La Torre kaj Jouko Lindstedt. Poste laŭreatiĝis Osmo Buller (2001), Michel Duc Goninaz (2002), Dafydd ab Iago (2003), Helmar Frank (2004), Povilas Jegorovas (2005), Bertilo Wennergren (2006), Peter Zilvar (2007), Ilona Koutny (2008), Aleksander Korĵenkov (2009), Katalin Kováts (2010), Dennis Keefe (2011), Peter Baláz (2012), Mark Fettes (2013), Mireille Grosjean (2014), Chuck Smith (2015) kaj Stefan MacGill (2016). En 2017 la elektado de la Esperantisto de la Jaro okazis la dudekan fojon. Ĉi-jare 17 kandidatigantoj proponis 20 kandidatojn, al kiuj 18 elektantoj jene donis siajn voĉojn:

Trezoro Huang Yinbao — 11 voĉoj


Hori Jasuo — 8 voĉoj

Richard Delamore (Evildea) — 5 voĉoj

Kvar kandidatoj ricevis po du voĉojn, ses kandidatoj ricevis po unu voĉon.

Trezoro Huang Yinbao, 55-jara ĉina agronomo, ekonomikisto kaj entreprenisto, prezidanto de la Esperanto-Centro Ora Ponto, kunfondinto de la Internacia Agrikultura Esperanto-Asocio, estas elektita Esperantisto de la Jaro 2017 pro tio, ke en 2017 li iniciatis kaj ekredaktis la Esperanto-version de Unesko-Kuriero, kunmetis por ĝi tradukteamon kaj krome lanĉis la sendependan revuon Tra la Mondo.

Gratulon al la Esperantisto de la Jaro 2017 Trezoro Huang Yinbao, kiu estas la unua aziano ricevinta ĉi tiun honoran titolon!” – **Halina Gorecka**, Sekretario, el *La Ondo de Esperanto*




PRELEGO: NOVBABELISMO

Jam estas konfirmita la prelego de Fabrício Valle, redakcia direktoro de *Heroldo*, en la 85-a Itala Kongreso de Esperanto, en San Marino (de la 18-a al la 25-a de aŭgusto 2018). La temo estos “La Fundamento de Novbabelismo”. Pliaj informoj ĉe <http://kongreso.esperanto.it/85/programo.htm>

TEJO: AKADEMIO

La organizaĵo de la junularo montriĝas tre lerta rilate novajn iniciatojn. Unu el la plej novaj estas TEJO-Akademio. Per bone planita retejo – simpla kaj bela – la akademio sin proponas helpi per reta trejnado en la kreado de nova grupo. La iniciato estas subtenata de la programo Erasmus+ de Eŭropa Unio. Ĉefe se vi planas fondi novan lokan grupon, vizitu la retejon <http://akademio.tejo.org/kursoj/loka-grupo/>



E-KONGRESO: DU EN UNU


La Brita kaj Tutkelta Esperanto-Kongreso 2018 okazos de la 13-a ĝis la 17-a de aprilo 2018 en Aberystwyth. La bela apudmara kimra urbo Aberystwyth gastigos la plej grandan Esperanto-kongreson en Britio: la 99-an britan kaj 3-an tutkeltan. Komenciĝos la evento vendredon, la 13-an, kaj daŭros ĝis mardo la 17-a de aprilo 2018. Eblas jam aliĝi! <https://britakongreso.org/eo/>

E-GAZETARO: THE WASHINGTON POST ESTU MODELO

La ĵurnalo *The Washington Post*, kiu dum du sinsekvaj jaroj profitis, anoncis ke ĝi celos ekspansion de sia redakcio kaj de siaj komercaj agadoj. En Esperantujo la vivo de la malmultegaj periodaĵoj ne estas facila. *Heroldo de Esperanto*

travis tre malfacilan periodon, sed nun reagas rapide. Nun eldonata en Brazilo, kie estis lanĉita ankaŭ la versio de la gazeto fondita de Teo Jung en la portugala lingvo, *Heroldo* celas fariĝi fenomeno de la E-gazetaro, samkiel la usona citita ĵurnalo.





Scienca Heroldo

Sukcesa metodo por kontraŭbatali infektojn per fadenovermoj sen riski gravajn kromefikojn

Christoph Klawe

Onkozerkoj estas aparta familio de fadenovermoj kaj apartenas al la fadenverma superfamilio de filariuloj. Ekzistas diversaj specoj de onkozerkoj, inter kiuj *Onchocerca volvulus* kaj *Loa loa*. Ambaŭ kaŭzas gravajn malsanojn ĉe homoj. Infektoj per *Onchocerca* volvulus ofte okazas en la tropikaj regionoj de centra Afriko kaj Mez-kaj Sud-Ameriko, dum *Loa loa* nur ekzistas en centra Afriko. En Afriko ekzistas regionoj, kie ambaŭ verminfektoj ofte okazas ĉe la samaj gemalsanuloj.

La vivciklo de ambaŭ parazitotaj dependas de specifaj pikantaj kuloj aŭ muŝoj. Ili portas larvojn de la vermoj en siaj rostroj kaj pikante transmisiis ilin al homoj, en kiuj poste maturiĝas la vermo al plenkreska parazito, kiu vivas sub la haŭto aŭ en limfa teksaĵo. La sekse matura vermo poste naskas aliajn larvojn, t.n. mikrofilariojn, kiuj naĝas en la sango kaj estas englutataj de pikantaj fluginsektoj, tiel ke la ciklo rekomenciĝas.

Malsano ekestas el la fakto, ke vermoj *Loa loa* mem migras tra la subhaŭta teksaĵo. Kadre de tiu migrado ili kelkfoje aperas sub la malmola travidebla haŭto de la okuloj (skleroto), kie ekzamenanto foje povas facile observi la vermojn. Malsanigas sekve la inflamaj reagoj rezultantaj el la migrado, kiel haŭtdoloro kaj preskaŭ netolerebla juko.

De la infekto per *Onchocerca* volvulus rezultas la t.n. riveroblindeco, ĉar la migrado de la mikrofilarioj kaŭzas ĉefe inflamajn reagojn ĉe la okuloj, kies fina efiko estas blindeco. Kaj la kuloj, kiuj transmisiis la malsanon, bezonas akvon por reproduktado kaj sekve vivas ĉe la bordoj de riveroj.

Nuntempe ekzistas tre efika medikamento kontraŭ la malsanoj kaŭzataj de filariuloj (filariozoj), nome ivermektino. La invento de ivermektino (merkata nomo: Mectizan estis tiom grava atingo, ke la pri tio kunlaborintaj sciencistoj, William C. Campbell kaj Satoŝi Omura, en 2015 ricevis la Nobel-premion pri medicino. Ege admirinda kaj modela estas la fakto, ke la tiama ĉefo de la (ivermektinon produktanta) farmacia firmao MSD, s-ro Pindaros Roy Vagelos, decidis disponigi la kuracilon preskaŭ senpage al la regionoj, kie ĝi estas bezonata (retpaĝaro de la Mectizan-donacprogramo: <https://www.mectizan.org>). Do ekde 1988 ivermektin-tablojdoj estas vastskale disdonitaj kadre de la "Afrika programo por kontrolo de Onkozerkozo" en regionoj de Afriko, kie filariozoj ofte kaj regule okazis (endemiaj regionoj). Tamen en la jaro 1996 oni rimarkis, ke la apliko de la kutime tre bone tolerata ivermektino en Kameruno estis komplikita de la oftega okazo de grava kaj kelkfoje vivminacanta kromefiko, t.e. ŝvelado de la cerbo (encefalopatio).

Tial ekzemple en la distrikto Okola de Kameruno la registaro eĉ ĉesigis la disdonon de la medikamento. Baldaŭ evidentiĝis, ke encefalopatio okazis nur ĉe pacientoj, en kies sango abundis mikrofilarioj de *Loa loa* (pli ol 30000/ml). La inflama reago pro la amase kadukiĝintaj mikrofilarioj kaŭzis sangungluaĵojn (trombojn) kaj enlason de fluido en la teksaĵoj de la cerbo.

Do la tasko de sciencistoj estis eltrovi la pacientojn, kiuj havas grandan riskon suferi pro tiu danĝera kromefiko. Nova publikaĵo en *New England Journal of Medicine* de la 23-a de novembro 2017 ja priskribis tiurilatan sukceson. Simpla aparato, kiu kombinas poŝtelefonon kun samdimensia sanganalizmaŝineteto (*LoaScope*, video pri la funkciado de la aparato: <https://goo.gl/f3pL4z>), rapide kaj facile helpas trovi la pacientojn, kiujn atendas danĝero per ivermektino pli verŝajne ol efika helpo (N Engl J Med 2017;377:2044-52). Vastskala kaj nun tute sekura disdono de ivermektino povis rekomenciĝi. Editoro avertas, ke tiaj ekzamenoj ofte devas alfronti antaŭjuĝojn en la populacio: kadre de simila programo pri malario en Kenjo kelkaj personoj rifuzis la ekzamenon, ĉar ili ne komprenis la kialon de ekzameno se ili ne havis simptomojn aŭ timis kaŝan kampanjon por eltrovi aidoso-pacientojn aŭ pripensis alian eventuale malican esploron.

Kriptenigmo

Por ĉiu numero, unu litero. Post plenigo de la tuto, aperos en la distingitaj ĉeloj la nomo de tre konata lego-libro por komencantoj, verkita de Claude Piron.

Laŭdo pro io akirita.		10	24	22	26	3	8
Praktiki, trejni.		2	14	18	10	6	9
Parto de lando, landero.		18	5	9	8	12	8
Enhavanta eblecon de malbono, de malfeliĉo.		24	12	27	18	10	24
Laŭ maniero plaĉa kaj plezuriga.		5	10	24	4	3	18
Grupo de kunuloj, kiuj ŝatas unu aliajn.	24		9	2	24	10	8
Kompletiga, plu okazanta.	15		29	10	9	5	24
Malkovri, elpensi, inventi.	18		22	10	8	23	9
Mateniĝas.	22		5	9	27	24	21
Tio kio aperas antaŭ la okuloj, fantomo.	24		18	10	24	28	8
Penso-instiga, kiu inspiras pripenson.	25		12	21	9	5	24
Plenaĝul', grandaĝul'.	5		24	12	15	26	3
Tia ke oni povas vidi ĝin.	23		15	18	4	3	24
Personoj, vivuloj.	18		22	26	3	8	1

KRUCENIGMO

Nivelo: Facila

Katenita, ne libera hom'	↓	Akver'	↓	Forte vaporiĝi	↓	En bona maniero	↓	Patrino de patr(in)o
Societo por amuzo	→			↓		Forigi erarojn		↓
Duop', du personoj kune		Brita-usona esp-isto	→			↓		
		Natura flu' de akvo						
			↓	Rabo-besto	→			
				Celata vojo				
				↓		Nomo de la litero R	→	Buŝa elvortigo
Tre forte deziri		Pronomo	→			En ne difinita loko	→	Kaŭzi lacecon pro troa ripetigo
		Iris, piediris						↓
Senmanka, senerara	→							
						Nia komuna loĝeĵ'	→	
						Aranĝi la harojn		
En ĉiu jaro		Speco de korto-birdo	→			↓		
Sinsekvo de nomoj		Senti doloron						
		↓				Person' alta	→	Aparat', instrument'
						↓		
				Granda kvant' kune	→			Agri, krei, produkti
Internacia Somera Universitato (mall.)		Embaras', maloportunaj'	→	Lucien Bannier — franca esp-isto	→			Vasta kaj senflua etendaj' da akvo
								↓
Afablaj, helpemaj	→							Junulara Esperanto-Semajno (mall.)
								↓
						Grupe, amase	→	
Estu utila								
Mi kaj vi	→			Komprenis skribitan tekston	→			

Helpo: 3 - ĝen., 4 - amas., tedl., 5 - avidi., serv., sklav., 6 - Tonkin

Solvaj ĉe <http://bit.ly/HdE5-enigmoresultoj>

ARTIKOLO

Sovaĝuloj sed foje nobluloj

Trevor Steele

El la vidpunkto de la aborigenoj de Aŭstralio, la komenco de brita setlado (fakte en formo de gulaĝo por malliberuloj forsenditaj el Britio) estis ankaŭ la komenco de katastrofa detruado de vivmaniero kun multjarmila historio. La britoj de tiu tempo absolute ne agnoskis, ke la aborigenoj rajtas posedi sian teron. La indiĝenoj estis ja primitivuloj, kiuj devis cedi sian lokon al la supera eŭropa kulturo.

Tiu sinteno pri la aborigenoj estis preskaŭ universala inter britoj. Parta escepto estis Watkin Tench, malaltranga oficiro de la mararmeo. Li estis akuta observanto de multaj aspektoj de la punktonio, kaj liaj rakontoj estas nia plej leginda kroniko de la fruaj jaroj.

Tench estis lojala monarhisto kaj neniam dubis, ke la britoj rajtas establi sian kolonion. Ke eŭropa civilizacio kaj kristanismo estas superaj al ĉiaj eblaj rivaloj, li ne dubis. Samtempe li kiel esceptulo aprecis la inteligenton kaj talenton de la aborigenoj. La suba teksto estas

elĉerpaĵo el liaj verkoj *Rakonto pri la Ekspedicio al Botani-Golfo kaj Kompleta Kroniko pri la Setlejo ĉe Haveno Jackson* (A Narrative of the Expedition to Botany Bay kaj A Complete Account of the Settlement at Port Jackson), aperintaj respektive en 1789 kaj 1793.

Nia vojaĝanta amiko Boladeree ... proksimume je tiu tempo ofendis en maniero, kiu devigis nin atenti. Li prijetis per lanco malliberulon en arbaro kaj vundis lin. La vero estis, ke iu malica homo el nia blankula grupo fiintence detruis lian kanuon, kaj li venĝis tiun atakon je la unua senarmila nia homo renkontita. Nun ŝajne li rigardis la aferon ĝustigita; kaj probable tia estas la kutimo, kiun ili havas en sia socio en similaj kazoj. Sed ekscinte, ke estas anoncita ordono, ke oni kaptu lin aŭ, se tio ne estos plenumbla, ke oni pafu lin, li prudente ĉesigis ĉian kontakton kun ni kaj ne estis vidata dum longa tempo.

Tamen, se foje ili vundis nin, por kompensi, ili ofte estis alta-grade komplezemaj al tiuj, kiuj bezonis ilian helpon. Du ekzemploj de tio okazis antaŭ nelonge. Boato

renversiĝis sur la haveno. Banelon' kaj kelkaj aliaj indiĝenoj, kiuj vidis la akcidenton, tuj enplonĝis kaj savis ĉiujn personojn. Kiam ili surbordigis ilin, ili malvestis ilin, ekflamigis fajron kaj sekigis iliajn vestojn, donis al ili fiŝojn por manĝi, kaj gvidis ilin al Sidnejo.

La alia ekzemplo temis pri soldato vojerarinta en arbaro, kiam li renkontis grupon da indiĝenoj. Li komence ne sciis ĉu fuĝi aŭ peti ilian helpon. Vidinte inter ili iun konaton, li decidis komuniki sian mizeran staton al li kaj fidi je lia malavareco. La indiano² diris al li, ke li vagis longan distancon for de sia hejmo, sed ke li kondukos lin tien, sub la sola kondiĉo, ke li transdonos al li la fusilon en siaj manoj; li promesis porti ĝin por li kaj redoni, kiam ili poste apartiĝos. La soldato malemis fordoni sian armilon; tiel li metus sin tute en ilian potencon. Sed, ĉar li ne vidis alternativon, li fine konsentis. Sekve la tuta grupo surterigis siajn lancojn kaj fidele eskortis lin al la plej proksima parto de la setlejo. Tie ili redonis la fusilon kaj foriris, ne petinte kaj laŭŝajne eĉ ne atendinte ian repagon.

1 Nuntempe oni skribas *Bennelong*. 2 Tiumtempe oni ofte uzis tiun terminon pri la indiĝenoj de Aŭstralio

ORIENTAJ STUDIOJ

Vojo de moderna jogo

Joachin Verdin*

Ekzistas plurspecaj jagoj: ĉi tiu, pri kiu temas, estas vojo al perfekteco por la nuna homo de la okcidenta kulturo. La reĝa jago estas scienca sistemo, kiu kondukas la homon al la plej alta nivelo de la evoluo atingebla en la homa karno. La reĝa jago postulas multon da laboro kaj abnegacion, kaj per tio ĝi ne diferencas de la aliaj sistemoj de konscia memperfektigado.

La moderna reĝa jago konsistas el ok gradoj. Jen la sanskritaj nomoj skribitaj laŭ la respektiva elparolo:

- *Jama*;
- *Nijama*;
- *Asana*;
- *Pranajama*;
- *Pratjahara*;
- *Dharana*;
- *Dhjana*;
- *Samadhi*.

De la unua ĝis la kvina grado estas la enirvojetoj (vojetoj de preparigado). La sekvaj tri gradoj estas la ĝusta vojo: sur ĝi la jogano atingas la kleriĝon.

La enirvojeton la disĉiplo faras dum sep, dek kvar aŭ dudek unu jaroj: dependas de la kvanto da laboro, al kiu oni sin dediĉas, kaj de la volo kiun oni havas. Se dum dudek unu jaroj la disĉiplo ne atingos sin sufiĉe, tiu do ne taŭgas por la vojo de la moderna reĝa jago kaj atendu ĝis la sekvonta enkarniĝo.

Sur la enirvojetoj la disĉiplo iras tra la kvin gradoj kaj lernas ilin kiel lernejan lernobjekton, ĉiujn samtempe dum la tuta periodo.

La unua lernobjekto estas purigado (*Jama*), en la senco senigi sin je la malvirtoj de sia karaktero. Gvidas la lernanton ĉi tie la kvin ordonoj de la reĝa jago:

1. Ne mortigu;
2. Ne mensogu;
3. Ne ŝtelu;
4. Vivu modere;
5. Ne akceptu donacojn.

Nun la signifosfero de la ordonoj estas pli vasta ol imagas la homo. Nur ekspliki kaj montri la signifosferon povas esti la temo de aparta libro. Pleje gravas ke la ordonoj enhavas ĉiujn moralajn malpermesojn de la homo de la nuna civilizacio.

Praktike sur ĉi tiu grado la disĉiplo mem fiksi por si la aron de moral-malpermesoj kaj klopodu observi ilin. Tio estas la plenumenda laboro de la unua lernobjekto. La celo de la laboro estas purigi sin de la malvirtoj de sia karaktero.

La dua lernobjekto (*Nijama*) estas la akirado de virtoj, do pozitivaj ecoj de la karaktero. Ĉi tie la reĝa jago donas kvar virtojn, kiujn oni devus enkonstrui en sia karaktero:

1. *Viveka* – distingi vantaĵojn, pasemaĵojn, pereemaĵojn k.s. de iliaj maloj;
2. *Viraga* – la povo ne zorgi pri la efikoj de siaj klopodoj;



3. *Satsampatti* – la sesspeca kapablo; a) *sama* – penskontrolo; b) *dama* – agadkontrollo; c) *uparama* – persisteco en la strebado al la celo; ĉ) *titikŝa* – pacienco elteni la malsukcesojn, kaj toleremo al ĉiuj; d) *sraddhana* – memfido; e) *samadhana* – interna ekvilibro;
4. *Mumukŝu* – strebi al la kleriĝo.

La signifosfero de la virtoj estas vastega kaj certe enhavas ĉiujn moralajn ordonojn de la homo de la nuna civilizacio.

Praktike la disĉiplo mem determinas la moralan ordonaron kaj klopodas observi ĝin: tio estas la laboro de la unua lernobjekto.

La laboroj de *Jama* kaj *Nijama* estas interligitaj kaj kompletigas sin reciproke. La disĉiplo senigas sin je la malvirto kaj samtempe sur ties loko enkonstruas ĝustan virton de la karaktero.

La tria lernobjekto (*Asana*) signifas sintenon. Sur tiu ĉi grado la disĉiplo zorgas pri sia organismo por esti sana psike kaj korpe. Por tio la disĉiplo faras interalie kelkajn fizikekzercojn el la sistemo de la korpa jago. Oni ankaŭ klopodas ĝuste kondukti en la vivo, precipe koncerne higienon kaj memnutradon. Tamen ne tio pleje gravas, ĉar oni plej atentigas sian spiritoteniĝon; ĝin difinas la okprincipa vojetoj:

1. Ĝusta scio – formi la nociojn pri la vivo kaj la mondo;
2. Ĝustaj volontoj – prudenti pri la decidoj;
3. Ĝusta ago – konformigi la agadon al postuloj de cirkonstancoj;
4. Ĝusta vivado – la vivo kiel lernejo kaj lernado;
5. Ĝustaj streboj – la senco de siaj strebadoj kaj pritaksado de ili;
6. Ĝusta streĉa atento – rilatas la memoron, spiritajn ekzercojn;

7. Ĝusta vorto – la metodoj de siaj elparoloj, la neceso kaj valoro de ili;
8. Ĝusta meditado – koncentriĝi en si mem, enigi sin en la enon spiritan.

La laboro de la lernobjekto celas fari la ĝustan, konforman kaj taŭgan teniĝon.

La kvara lernobjekto (*Pranajama*) estas ligita kun la ritmo. Sur ĉi tiu grado la disĉiplo enkondukas ritmon en sian ĉiutagan vivon. Difinitan agon li/ŝi faras ĉiam en la sama tempo – ĉefe se temas pri enlitiĝo, endormiĝo, vekigi, ellitiĝo, manĝado, laborado, lernado, ekzercado, ripozado kaj aliaj. Krome la disĉiplo klopodas ritmigi siajn spiradon, pulsbaton, paŝadon, ekskreciadan ktp. Ankaŭ oni atentigas la bioritmojn de la organismo, la ritmojn de la naturo, kaj oni klopodas harmoniigi, konformigi al ili sian vivon.

Ofte ĉe tiu lernobjekto la disĉiplo faras simplajn kaj utilajn spirekzercojn. Tamen la ĉefa celo estas ritmigi en sia vivo ĉion, kio taŭgas kaj eblas, por plibonigi siajn vivajn funkciojn.

La ritmigo koncernas ĉiun tempospacon, do minuton, horon, tagon, monaton, jaron kaj la tutan vivperiodon.

La kvina lernobjekto (*Pratjahara*) signifas regi la atenton de siaj sensoj, do la disĉiplo tion ĉi lernas. La celo estas tiel regi la atenton de siaj sensoj, por povi fiksi ĝin nur al tiuj, al kiuj oni deziras, kaj ricevi nur deziratajn impresojn. Ekzemple, koncentrante la atenton al la vidsenso, oni ricevas nur difinitajn vidimpresojn kaj neniujn aliajn: estas kvazaŭ ne ekzistus aliaj sensoj krom la vida.

La perfekteco de tiu objekto estas povi tute malfunkciigi ĉiujn sensojn kaj ne reagi al iu ajn stimulo, kvazaŭ mortinto.

Sur ĉi tiu kvina grado finiĝas

la enirvojetoj; trapasinte ĝin la disĉiplo povas suriri la ĝustan vojon de la moderna reĝa jago.

La priskribo kaj la klarigado de la gradoj de la ĝusta vojo (la tri lastaj) estas malfacilaj, pro tio ke oni celas montri tion, kio estas netransdonebla skribe aŭ parole. Necesas travivi la ĝustan vojon por kompreni ĝiajn gradojn. Krome la homa menso ne kapablas bone kompreni tion, des pli ke la homa lingvo ne povas kontentige esprimi tiujn aferojn. Nur eblas neperfekte skizi tiujn ĉi tri gradojn.

La sesa grado (*Drarana*) estas koncentriĝo. La celo estas havigi sperton kaj lerton pri koncentriĝo al determinitaj objektoj aŭ impresoj. Sur ĉi tiu grado la disĉiplo utiligas la kapablon regi la atenton de siaj sensoj, kiun li/ŝi ellernis sur la kvina grado.

La sesa grado estas la metodo por akiri scion pri objektoj – la disĉiplo ricevas kleriĝon en la mondo de la kernaj sensoj. La disĉiplo ricevas multe pli precizan kaj ampleksan scion ol per iu ajn alia metodo, ĉar nun li/ŝi komencas utiligi siajn supersensojn, do iom post iom kapabligas sin ricevi impresojn el la unua transmondo (la lasta mondo de la materio jam nevidebla por la ordinara homo), nomata astra mondo. La sepa grado (*Dhjana*) estas medito. Sur tiu ĉi grado la disĉiplo malfermas por si la vojon en la mensmondo (unu el la transmondoj estas nomata tiel). Ĉi tie oni kreas novajn ĝustajn nociojn pri la objektoj, utiligante nur meditekzercojn. La disĉiplo disvolvas la mensajn povojn de sia mensa korpo por lerni ricevi la impresojn de siaj supersensoj, kiuj apartenas al la mondo de la menso. Tiu medito klerigas la disĉiplon pri la mensmondo kaj plue pli disvolvas la superordinarajn kapablojn.

La oka grado (*Samadhi*) estas ĉiokonscio. Sur tiu ĉi grado la disĉi-

plo atingas la kleriĝon rekte de la Spirito, oni povas diri de la mondo de perfekteco. Tiam la disĉiplo restas en la plej alta nivelo (la lasta grado) de evolucio; oni nomas tion ankaŭ kuniĝo kun Dio.

Sur tiu ĉi grado la disĉiplo ricevas la finan perfektecon, kiu atingebblas de la homo. Tiam finfine malfermiĝas ĉiuj supersensaj organoj, donante preskaŭ nelimitigitajn povojn kaj scion.

Ju pli alte estas la homo sur la ĝusta vojo, des pli granda kaj farena laboro atendas lin/ŝin.

Malfacilas konstati, kia estas la homo sur tiu alta evolunivelo, kiun li/ŝi scipovas kaj reale faras. Ni scias nur, ke, por ni ordinarioj, li/ŝi estas perfekta, kvankam malrelative ne estas tiel.

En la momento kiam la jogano atingas la finan perfektecon – kiu atingebblas en la homa karno – li elkarniĝas kaj transiras al la vivo sur pli alta nivelo de la evolucio. Tiam la jogano mortas en la tera mondo, por plue strebi al la ekstrema celo de la evolucio.

La moderna reĝa jago estas scienca sistemo kondukanta la homon al la plej alta nivelo de la spiritevoluo atingebla en la homa karno. La fakto ke la difinoj devenas de la malnova origina reĝa jago, kaj estas uzataj ĉi tie (pruntitaj de ĝi), ne spegulas vere la signifojn: ne tio tamen gravas sed la vojo mem, laŭ kiu povas iri la homo de la nuna okcidenta civilizacio.

Finante oni devas substreki, ke la priskribo estas tre neperfekta kaj ne donas pli multon ol kelkajn grenojn el la scio pri la moderna reĝa jago – vojo al perfekteco.

La plej bona metodo atingi la pluan scion pri ĝi estas la survojiĝo: instigi al tiu ĉi faro estas la ĉefa celo de la artikolo.

* Aperis originale en *Almanako Lorenz* – 1996

Nova NRO venos en la mondon por agado per Esperanto

Inter marto kaj majo 2018 Esperantujo estos naskiĝejo de nova internacia neregistara organizaĵo, kiu adoptos Esperanton kiel laborlingvon por sia agado en internacia skalo.

Se interesas vin agado per Esperanto sur unu el la plej diversaj kampoj de la tria sektoro (NRO-j), Sociala Lingvo sin prezentos kiel ŝlosilan mondan organizaĵon uzantan Esperanton por tre konkrete roli en la evoluigo de la praktika uzo de Esperanto. Vi povos agadi ĝuste en via preferata laborkampo!



CELARO



Roli kiel inkubatoro (kovejo) de ĉefmotoraj kaj lokmotoraj NRO-j ĉie tra la mondo. Tiuj NRO-j laboros harmonie en horizontala nivelo



Organizi internacian reton de komunumaj lingvo-lernejoj, kie Esperanto rolos kiel propedeŭtika lingvo



Organizi kaj funkciigi reton de ĉiuj ĉefmotoraj kaj lokmotoraj NRO-j, en sistemo bazita sur internacia interorganiza mutualismo

KIAJN MEMBROJN NI SERĈAS EKDE NUN?

Sociala Lingvo jam havas bazan grupon laborantan por ĝia fondo en Brazilo (sidejo de la nova NRO Sociala Lingvo), sed nun venas la horo internaciigi ĝian fondo-grupon, per enplekto de Esperantaj socialaj aktivuloj el la tuta mondo. Tiajn homojn ni serĉas:

- pretajn aktivi sur sia preferata kampo: lingvo-instruado, edukado, kulturo, scienco, solidara ekonomio, homaj rajtoj, arto, homa solidareco, sociala asistado ktp;
- pretajn agadi konkrete ĉu kadre de Sociala Lingvo, ĉu kiel kunkreantoj de ĉefmotora aŭ lokmotora NRO en sia urbo.

Atentu

Oni ne devos pagi aliĝkotizon por fariĝi membro de Sociala Lingvo, nek jare, nek monate, sed aliflanke ne interesas nin pasivaj membroj. Sociala Lingvo estos NRO de aktive agantaj membroj. Malmultaj ni estos, sed ni volas konkrete fari multon. Simpatiantoj povos poste fariĝi subtenantoj.

Kontaktu nin tuj kaj prezentu viajn demandojn/dubojn. Eksciu kiel vi povos partopreni ĉi tiun grupon kiu volas kunlabori pri la ŝanĝo de la mondo per Esperanto.

<http://bit.ly/partopreno-socialalingvo>

Sociala Lingvo Per Esperanto ŝanĝi la mondon



Heroldo

spegulo

ARTO KAJ KULTURO

*Kaj tiuj, kiuj estis vidataj dancantaj
estis konsiderataj malsanaj de tiuj,
kiuj ne povis aŭskulti la muzikon.*

Friedrich Nietzsche

Kajero de arto kaj kulturo de Heroldo de Esperanto • N-ro 3 (3) 1-a jarkolekto • Eldonata en Trindado - GO (Brazilo) kaj distribuata kune kun HdE

www.heroldodeesperanto.com



Kio estas recenzo? Ĉu aro de “lapidaraj asertoj kaj drastaj juĝoj intelekte ŝargitaj el testosterono”, por uzi la vortojn de la hispana sociologo Ignacio Sánchez-Cuenca?

Xavi Alcalde per sia artikolo “Kial oni devas akcepti kritikojn” prezentas interesajn pripensindaĵojn pri tiu temo. **p. 2**

Jes Ja!

La rubriko *Jes Ja!*, de César Dorneles, la lastan fojon aperas en *Spegulo*, sed plu aperos dumonate aliloke en *Heroldo*. **p. 2**

Inspiro devas abundi

Juna kaj tre talenta, la itala pianisto Enrico Coraci kredas, ke la inspiro, precipe en la muziko, devas ĉiam abundi. “Ĉiu muzikaĵo, ĉiu verko, havas sian propran ‘mondon,’” li deklaris al Roberto Pigro, kiu intervjuis lin por *Heroldo*. **p. 3**

Kunlaboru kun *Spegulo*

La HdE-kajero de arto kaj kulturo bezonas altnivelajn kunlaborantojn. Proponu vin kiel konstantan volontulan verkanton aŭ tradukanton ĉe <http://bit.ly/Spegulo-kunlaborantoj>

ARTIKOLO

Kial oni devas akcepti kritikojn

Xavi Alcalde

Kiom komplike kaj tamen kiom necese estas akcepti kritikojn! Konstruaj kritikoj helpas nin plibonigi niajn pensojn. En universitataj kadroj, tio estas (aŭ devus esti) kutima praktiko. Ekzemple ni verkas malneton de faka artikolo kaj sendas ĝin al kolegoj ĝuste por ricevi kritikojn. Poste ni dankas niajn kritikintajn kolegojn (ne nur kiam ili laŭdis niajn verkojn!), ĉar tio postulas seriozan kaj honestan laboron kaj ĉar la rezulto verŝajne estos pli bona artikolo.

En nia “verda mondo”, homoj ne facile akceptas kritikojn. Tio okazas ĉiunivele, sed plej evidentas en la okazo de (beletraj) verkistoj. Anstataŭ esti racia dialogo pri malsamaj vidpunktoj, konversacioj foje iĝas emociaj kaj ne-malofte enhavas insultojn. Miaopinie pluraj kialoj ekzistas. Foje kritikoj ne estas konstruaj. Foje ili okazas en medioj, kiuj ne tre taŭgas, kiel sociaj retejoj. Kaj foje ili atingas homojn pretajn ricevi nur laŭdojn.

RECENZOJ

Malsame ol en la ekstera mondo, en Esperantujo ne malkutimas aŭtoraj reagoj al recenzoj. Tio ne nepre malbonas, kaj fakte povas esti ke pro tio ekos intereso kaj ĝentila dialogo inter malsamaj perspektivoj, de kiuj la legantoj povos certe profiti. Tamen foje tiuj reagoj estas verkataj pro fiero. En tiuj okazoj neniu dialogo ekestas, sed nur pasia defendo de la propra opinio kaj de la propra verko, kiam la aŭtoro senkompate atakas la recenzinton.

Kiam la kritiko estas detrua, tiu defendo kompreneblas. Se ekzemple, anstataŭ fokusiĝi pri konkreta verko, recenzantoj pritraktas la verkiston, recenzantoj ricevas la kritikon kiel personan atakon kaj respondas samnivele. Aliffoje recenzoj estas aro de “lapidaraj asertoj kaj drastaj juĝoj intelekto ŝarĝitaj el testosterono”, por uzi la vortojn de la hispana sociologo *Ignacio Sánchez-Cuenca*. Tiajn kritikojn la itala sociologo Diego Gambetta nomas *diskursiva masklismo*, tiel substrekante, ke plej multaj homoj kiuj tiel verkas estas viroj. Oni povus aldoni, ke tiuj viroj kutimas esti blankhaŭtuloj el okcidentaj landoj.

SOCIAJ RETEJOJ

Iam mi atentigis pri la fakto, ke laŭ la nuna legantaro, verŝajne estas tro da revuoj en Esperantujo². Tiel, ĉar ne ĉiam opiniantoj povas legi unu la alian, gravaj nuntempaj debatoj okazas en sociaj retejoj, kie kutime ja ekzistas multflankaj rektaj rilatoj inter multaj homoj. Tiuj retejoj certe utilas, sed verŝajne ne por atingi altkvalitajn debatojn. Esploroj montris, ke tie oni verkas sen necesa reflektado, tro rapide kaj emocie, kio rezultas en pli da polarizo kaj malpli da em-

patio. Alivorte dirate, oni ne konvinkas iun ajn per tiaj dialogoj.

Mi mem, de tempo al tempo, klopodas debati trankvile en tiuj laŭmodaj retmedioj kiel Fejsbuko. Bedaŭrinde mi konfesas, ke preskaŭ neniam mi sukcesas. Unu kialo kuŝas certe en miaj propraj mankoj kaj limoj, sed verŝajne tiu ne estas la sola. Ekzemplo de tiaj fiaj okazis en konversacio kun konata opinianto, kiu kontentis pri la granda disvastigo atingita, en nacia medio, de artikolo pri nia literaturo. Mi serĉis tiun artikolon kaj legis ĝin. Parton de la enhavo mi taksis kontraŭefika, kaj jene mi esprimis min en mia komento: “bona disvastigado postulas, ke oni pensu ne nur pri kvanto, sed ankaŭ pri kvalito. Miaopinie la teksto enhavas kaj bonajn kaj plibonigeblajn erojn.” La celo estis diskuti pri tiuj malpli bonaj eroj, tiel ke estonte oni povus verki pli bonajn artikolojn.

Tamen, kvazaŭ pravigante la ĉefan ideon de tiu ĉi artikolo, la opinianto ne tuŝis mian argumenton en sia respondo, sed transformis la konversacion en dialogon inter surduloj, asertante “Ba, ĉio plibonigeblas” kaj ripetante sian ideon; tio estas, plivastigo bonas, sendepende de la plivastigita enhavo. Jen la perfekta reago de iu ajn verkisto al iu ajn kritiko. Imagu, se aŭtoro respondus tiel al kritiko fare de faka revuo pri plibonigenda artikolo: “Ba, ĉio plibonigeblas”.

ATENDI LAŬDON

Interese, en nia konversacio tiu opinianto menciis ankaŭ frazon, kiu eble helpas nin kompreni unu el la kialoj de la malalta kvalito de niaj debatoj en Esperantujo: “Mi estus atendinta laŭdon pro tio, ke ni atingis tian disvastigon.” Laŭ mi, temas pri honesta konfeso. Li vere atendis ĝin. Ĉu tio malbonas? Mi dirus, ke ne nepre. Fakte nuntempe verki en nia lingvo estas afero aktivula kaj pro tio sendube subteninda. Sed, kiel sciante, atendi laŭdon estas la unua paŝo al elreŭigo, kaj ne facilas trankvile, senpase kaj argumente reagi al elreŭigo.

Miaopinie tro ofte E-verkistoj atendas laŭdojn, precipe en la hodiaŭa epoko de sociaj retejoj kaj fejsbukaj ŝatoj. Foje tio ligiĝas al la grandaj egoj de prestiĝaj homoj. Nia eta komunumo ebligas elstariĝi al homoj, kiuj ne ĉiam atingus tian prestiĝon en la ekstera mondo (foje certe jes!). Denove, tio ne nepre malbonas, sed konscii pri tiu fakto devus fari el ni homojn aparte humilajn. Konklude tre gravas, ke ni ĉiuj kontrolu nian egoon, eĉ tiuj kiuj propramente kutimas esti laŭdataj.

Mi kontentus, se tiu ĉi artikolo estos kritikata per respekto kaj logikaj argumentoj. Se eble, ne en sociaj retejoj. Se eble, sen insultoj kaj sen personaj atakoj. Kiel reagon, mi pretas plibonigi miajn ideojn, akceptante la fakton, ke verŝajne ili ne tute pravas.

Jes Ja!

César Dorneles



La diferenco inter kokino kaj politikisto estas tio, ke politikisto klukas sed ne ovumas. (Millôr Fernandes, brazila verkisto)

Kiam oni parolas pri bankoj kaj raboj, demandu tuj: ĉu de ekstere enen aŭ de ene eksteren? (Millôr Fernandes, brazila verkisto)

Romo 1981. Intervjuo de Jorge Luis Borges, la fama argentina verkisto, al grupo de ĵurnalistoj. Lasta demando: al kio li atribuas la fakton, ke li ankoraŭ ne sukcesis gajni Nobel-premion pri literaturo? “Al la sveda saĝo”, li respondis.

Zamenhof estis sufiĉe modesta por konscii pri tio, ke la lingvo, kiu estas socia fenomeno, ne povas esti kreaĵo de unu sola homo, kaj li konfidis al la esperantistoj la ellaboron kaj la perfektigon de la lingvo. Kaj unu el la plej geniaj trovaĵoj de la Majstro estis, ke Esperanton, tuj post ĝia naskiĝo, li fianĉigis al poezio. (Kolomano Kalocsay)

Onidire la ruĝo estis la unua koloro kiun la homo nomis. Ĝi estas la unua kiun la bebo vidas. En malnovaj tempoj oni kredis, ke la koloro forigas malsanojn. Pacientoj kiuj suferis pro deprimado estis metataj en ĉambron kies muroj estis pentritaj per ruĝo. Oni kredis, ke la ruĝo vigligas la personojn. En Ĉinio la ruĝo estas la koloro kaj de la ĝojo kaj de la riĉeco. Sekve ĝi estas tre populara dum la jarfinaj festoj. La ruĝo estas antaŭnomo de homoj diverslingve: Rufus, Roy, Robinson, Scarlet, Ruby, Susana, Rossella ktp.



“Tio, kion ni emfaze nomas ‘la triumfo de nia afero’, ne estas io estonta kaj malproksima; tiu triumfo konsistas el la aro da ĉiutagaj konkretaj sukcesetoj nun realigeblaj. Esperanto ‘triumfas’ ĉiufoje kiam ĝi servas al iu”. (Hector Hodler)



En la 3-a jarcento a.K. ĉina imperiestro Qin kondamnis al bruligo milojn da historiaj skribaĵoj, por ke li havu la nuran vidpunkton pri la ĉina pasinteco. La flamoj daŭris tri jarojn. Nur post kiam mil intelektuloj estis enterigitaj vivaj, la persekutado alvenis al la fino.

Onidire iam Napoleono Bonaparto, la franca imperiestro, parolis kun juna itala damo. Li demandis al ŝi: “Tutti gli italiani danzano sì male?” (“Ĉu ĉiuj italoj dancas tiel malbone?”); kaj ŝi ludvorte tuj respondis: “Non tutti, ma... buona parte!” (“Ne ĉiuj, sed... granda parto!”).

¹ Vidu lian intervjuon pri lia lasta libro *La Desfachatez* *Intelectual en hispana reta ĵurnalo*: <http://cxtx.es/es/20160224/Politica/4476/Sanchez-Cuenca-Savater-Cercar-Munoz-Molina-intelectual.htm>

² Vidu “Tradicio kaj moderneco. Pri TEJO kaj la Civito”, *La Ondo de Esperanto*, februaro 2017, pp. 38-39, http://sezonoj.ru/2017/01/alcalde/?utm_source=rss&utm_medium=rss&utm_campaign=alcalde

Renkontiĝo kun Enrico Coraci, juna elstariĝanta itala pianisto

Enrico Coraci estas juna pianisto el Sicilio (suda Italio), laŭdire unu el la plej interesaj “novaĵoj” en la panoramo de la muzika komponado en la itala lando. Ni intervjuis tiun elstariĝantan artiston ekskluzive, klopodante eltordi la sekreton de sukceso, kiu kreskas de tago al tago kaj kiu, je la lumo de vere malofta talento kaj de la “senarmiganta” simpleco de ĉiuj komponaĵoj, ne ŝajnas destinita al baldaŭa fino.

Roberto Pigro

Saluton Enrico, ĉu vi povus paroli al ni pri via muzika agado?

Mia unua sperto rilate al muziko okazis tiam, kiam mi estis 11-jaraĝa. En junio 2008, kiam mi finis la elementan lernejon, miaj gepatroj enskribis min en la mezlernejon “Nino Navarra”, situantan en la urbo Alcamo (45.500 loĝantoj), en la provinco Trapani. Tiu mezlernejo proponis al la gelernantoj la eblecon elekti libervole, ĉu ĝui la instruadon de muziko posttagmeze, por ke oni lernu ludi plej diversajn muzik-instrumentojn. Mi sekvis la konsilojn de miaj gepatroj kaj liveris mian aligilon al la pri-muzikaj kursoj. Mia prefero, rilate al muzikiloj, estis gitaro aŭ fortepiano. Bedaŭrinde ili respondis, ke la lokoj por ambaŭ kursoj estis jam elĉerpitaj. Mi do ne povis aliri al ili. Estis fakte jam oktobro, kiam mi decidis aliĝi, kaj la jam alvenintaj petoj estis multegaj. Kiam mi estis jam forgesanta la ideon pri kroma posttagmeza lernado, iutage en oktobro eniris en mian klason la muzik-instruisto kun folio enmane. Li surprize legis mian nomon kaj demandis, kiu estas Enrico. Post komenca surprizo, mi komprenis, ke devas temi pri novaĵo koncerne al la muzikaj kursoj proponataj de la lernejo kaj levis la manon. Laŭte li demandis min, ĉu mi plu interesiĝas pri la lecionoj de piano. Estis unu lasta libera loko, ĉar alia lernanto estis ial rezigninta. Mi neniam eksciis, kiu estis tiu knabo, kiu forlasis la kurson. Sed mi vere dankas al li, ĉar mi respondis al la instruisto jese (kompreneble) kaj tiel ekvizitis la kursejon. Nun mi povas aserti sendube, ke tiu elekto ŝanĝis mian vivon, mian sorton! Ĉio estintus malsama en mia ĉiutageco, se tiu junulo estu restinta en la lernejo. La unua jaro estis tiu, kiu permesis al mi malkovri la muzikon en ĉiuj ties partoj. Tiu periodo ebligis al mi plibonigi miajn kapablojn: sufiĉis iom da engaĝiĝo, kiu ne mankis al mi. Kvankam absorbate de la multaj kaj daŭraj adoleskaj devoj, mi ĉiam dediĉis tempon al la muziko. Post la fino de la duagrada lernejo, mi enskribis min en teknikan/informadikan instituton, sed daŭrigis la lernadon de fortepiano kiel aŭtodidakto. Kaj ekde 2016 mi denove vizitas muzikan akademion en mia urbo, kuŝanta ĉe la maro, en nord-okcidenta Sicilio. Estas eble rimarkinde por via legantaro, ke ĝuste de mia urbo venis la fama poeto Cielo d'Alcamo, kiu vivis en la 13-a jarcento kaj skribis la poeziaĵon *Rosa fresca aulentissima*.

El kiuj artistoj vi ĉerpis inspiron por viaj komponaĵoj?



Mi kredas, ke la inspiro, precipe en la muziko, devas ĉiam abundi. La pianistoj, el kiuj mi inspiriĝis kaj kiuj transdonis al mi per la propra arto plej multajn emociojn estis certe Ludovico Einaudi, Yiruma, Giovanni Allevi kaj Yann Tiersen. Rilate al alia flanko de la muzika mondo, tiu klasika, mi admiris ege ankaŭ la muzikistojn Fryderyk Chopin, Wolfgang Amadeus Mozart, Ludwig van Beethoven, Franz Liszt, Johann Sebastian Bach.

Kiujn projektojn vi havas nun?

Ĝis nun mi aperigis 10 verkojn, sed mi ja komponis multajn aliajn, kiujn mi eldonos en posta momento, enkadre de estontecaj projektoj. Mi havas plurajn revojn koncerne

al la muziko. La ĉefaj projektoj, kiujn mi havas en la kapo, rilatas al la daŭrigado de muzika komponado. Mi okupiĝas cetere ne nur pri fortepiano, sed ankaŭ pri elektronika muziko (EDM, Electronic Dance Music). Mi intencas plue publikigi muzikaĵojn, malkovrigante al aliaj personoj tion, kio mia muziko estas; pli bone: tion, kio mi vere estas.

Kial vi iĝis membro de la kopirajta societo SIAE?

La Itala Societo de Aŭtoroj kaj Eldonistoj estas la organizo, kiu en mia nacio protektas la verkojn de artistoj. La membreco ja estas nun senpaga por ĉiuj, kiuj havas malpli ol 30 jarojn: do kial

ne legitimi siajn verkojn, protekti siajn rajtojn, defendi sin kontraŭ la risko pri plagiato?

Via rezonado estas tre logika. Bonvole parolu nun iom al ni pri via disko.

Mia unua albumo pri nura fortepiano titoliĝas *Liberarsi* (“Liberigi sin”) kaj aperis antaŭ nelonge en interreto (mi invitas vin elŝuti ĝin per iTunes: <http://smarturl.it/LiberarsiAlbum>; aŭ per Google Play: <http://smarturl.it/LiberarsiGoogle>). Oni povas mendi ankaŭ tradician kompaktan diskon, sendeban tamen por la momento nun al italaj lokoj. Temis pri projekto, kiun mi konceptis kaj pri kiu mi laboris longe. Ĝi kolektas dek miajn originalajn komponaĵojn, de mi verkitajn en la tempodaŭro de 18 monatoj per mia fortepiano (*Roland HP-203*). La titolo de la disko, sama kiel tiu de la unua verko, simbolas la ŝlosilan koncepton, la esencon, la atmosferon, kiun mi volis transigi pere de mia arto. Kaj, por esti sincera, doni titolon al ĉiu unuopa verko estas eble la plej malfacila paŝo, la plej kompleksa afero.

Kiel naskiĝis la ideo aperigi ĝin?

La ideo publikigi diskon mian estis ĉiam mia deziro, ekde la mezlernejaj jaroj. Mi ĉiam volis disvastigi mian muzikon, konigi min pere de la muzikarto. Mi amas eligi miajn emociojn muzikmaniere. Mi sentas min feliĉa, kiam la homoj diras, ke ili ŝatas tion, kion mi faras. Mi fieras, cetere, pri la prestiĝa dua premio, kiun mi gajnis ĉe la 15-a Nacia Konkurso “Urbo Palermo” la 29-an de majo 2009, komence de mia muzika agado. **Kion vi deziras ekzakte esprimi per viaj komponaĵoj?**

Ĉiu muzikaĵo, ĉiu verko, havas sian propran “mondon”, sian propran emociion, sian propran medion, sian propran kialon. Kiam mi verkas, mi provas ĉiam transdoni emociojn, kiuj ajn ili estas tiomome. Mi klopodas prezenti ilin kaj iel stimuli la aŭskultontaron. Mia muziko aliflanke estas tio, kio mi estas, kiel jam dirite.

Kiumaniere vi plenumis la filmeton de via unua verko?

La realigado de la filmeto de mia muzikaĵo *Liberarsi* (“Liberigi sin”), kiu haveblas ĉe la adreso <https://www.youtube.com/watch?v=6mXlqemqo8>, estis vere sukcesa, se oni konsideras la malgrandajn rimedojn, pri kiuj mi disponis. La elektita ejo, vere elvoka, estis la rifaro de Castellammare del Golfo - Scopello (Sicilio). Kvankam la filmado ŝajnas profesia, kredu min, ĉio estis farita senpage. Mi neniam povintus atingi tion sen la helpo de mia familio. Miaj parencoj ĉiam helpis al mi kaj stimulis min daŭrigi ĉi tiun pasion mian pri la muziko. Mi ŝuldas al ili multegon. Mi dankas ĉefe mian fraton, kiu efektivigis la filmadon per la droneo (flugroboto) *DJI Phantom 4*. Mi estas dankema ankaŭ al miaj gepatroj pro la subteno kaj la kunlaboro je la pretigo de la filmeto. Pri la muntada fazo, mi agis tute sole, kiel amatoro. La fina rezulto? Vi mem juĝu. Mi ĝojas, ĉar ĉiutage alvenas komentoj fare de spektantoj el la tuta mondo, kiuj ŝatas kaj la muzikon kaj la scenejon.

Vi naskiĝis en la 2-a de junio 1997, vi havas nur 20 jarojn. Kiuj estas la perspektivoj en la hodiaŭa Italio por juna sicilia muzikisto?

Se diri la veron, en Italio kaj precipe en mia insulo ne estas multe da perspektivoj por junaj muzikistoj. La itala arto ja estas ŝatata, sed mi opinias, ke en mia lando oni ne allasas la ĝustajn oportunecojn al junularo, kiu ilin oftege indas. Pro tio, ĉi-lastas sentas sin iom senkuraĝigita. Bonŝance ekzistas la interreto kaj, per simpla sendrata konekto, ni povas vojaĝigi nian muzikon al la tuta mondo. Se esperantistoj volas ekkontakti min kaj sendi al mi siajn komentojn pri mia muziko, konsilojn aŭ proponojn pri kunlaboro, tio tre ĝojigos min.

FACEBOOK: <http://facebook.com/enricocoraciofficial>
 INSTAGRAM: <https://instagram.com/enricocoraci>
 YOUTUBE: <http://www.youtube.com/enricocoraciofficial>
 SOUNDCLLOUD: <http://soundcloud.com/enricocoraci>
 TWITTER: <http://www.twitter.com/enricocoraci>



Fabrício Valle tra Eŭropo por *Heroldo* kaj Sociala Lingvo

Fabrício Valle, brazila esperantisto kaj redakcia direktoro de *Heroldo*, planas labor-ekskursi tra parto de Eŭropo inter la 8-a de junio kaj la 28-a de aŭgusto, sed nur per kunlaborado de lokaj grupoj el la principe celataj landoj*. Li povos tiel konkretigi sian mision por *Heroldo de Esperanto* kaj por la internacia neregistara organizo Sociala Lingvo.



CELO DE LA VOJAĜO

Diskonigi diversajn aspektojn pri la funkciado de la nova *Heroldo de Esperanto* kaj diskuti ĝian estonton; prezenti la internacian neregistaran organizaĵon Sociala Lingvo, kiu estos fondita inter marto kaj majo 2018 en Brazilo.

STRATEGIO

Italio estos lia bazo kaj de tie li plenumos sian laboron en kvar etapoj laŭ regionoj, ĉiam revenante en Italion post la fino de ĉiu etapo. La partopreno en ĉiuj grandaj eventoj de tiu periodo, inkluzive de la UK kaj de la Itala Kongreso de Esperanto, estas grava parto de la strategio.

KUNLABORO NECESA

Estos necesa sufiĉe frua enplektiĝo de lokaj grupoj por organizi kunsidojn. Fabrício Valle proponas plurajn elekteblajn prelegojn. Helpo por la gastado kaj eventuala eta financa kompenso pro la prelegoj estos bonvenaj.

PAGAJ KURSOJ

En urboj kun pli bone strukturita loka movado eblos organizi 12-horan enkondukan kurson de Esperanto por komencantoj kontraŭ aliĝkotiĝo. La diskonigado de la kurso okazos per interreto, per speciala retpaĝo en la loka lingvo kaj per lokaj rimedoj. Parto de la enspezo apartenos al la loka organizanto.

ITINERO

La itinero devas esti zorge kaj detale planata. Pro tio gravas tre fruaj kontaktoj inter Fabrício Valle kaj la potencialaj kunlaborantoj.

AGU

Agu tuj kaj diskutu en via grupo la proponon de Fabrício Valle. Li ŝategos koni vian grupon kaj interŝanĝi ideojn, prelegi, amikumi kaj Heroldumi. Lia retadreso estas redakciadirektoro@heroldodeesperanto.com

* Italio, Svislando, Francio, Britio, Germanio, Hispanio (kaj Katalunio klopodanta sendependiĝi), Portugalio, Nederlando, Belgio, Aŭstrio, Pollando, Hungario, Ĉeĥio kaj Slovakio